

EL POPOLA ĈINIO

中國新聞

2

2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.

ŭ-19034/2000

**Moroj pri la Printempa
Festo de Ĉinio**

MAKAO REVENIS!

★ POPOLA ĈINIO




La Birda
Insulo sur
altebenaĵo **17**



“Karnavalo”
sur la Leŭsa
Altebenaĵo **32**



20
Makao
revenis!



8 Saluton, 2000!



28
“Muzikista
Fojnbudo”
en la
Imperiestra
Palaco
en Pekino

ENKAVO

3 INTER NI

4 Nova plano pri naturaj sciencoj de Ĉinio

6 ĈINA KULTURO:

Kiel la ĉinoj rigardas drakon

12 POR KOMENCANTOJ:

Bovlo da supo; Forgesemo

13 "Miela monato" en Esperantujo (II)

15 ESP-NOVAĴOJ

16 ORIGINALE VERKITAJ:

La knaba venĝo

25 VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:

Jupo kaj kaptuko de li-oj

38 Moroj pri la Printempa Festo de Ĉinio

40 Novjara festo de ĉinaj nacimalplimulto

42 ĈINAJ E-ISTOJ:

Nuba, Ĝojlo kaj Rava

44 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:

Iom pri ĉinaj pladoj

46 EL ĈINAJ GAZETOJ

48 KURANTAJ AFEROJ

49 Versparo kaj lanterna enigmo

50 SUR NIA LIBROBRETO:

"La Familio"; "Cent Ĉinaj Fabloj"

51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:

Emajla elefanto



En festotago

Foto de Niu Xiwu

La Printempa Festo de Ĉinio riĉas je ludoj, kiaj leondanco, stilzo-irado kaj prezentado de teatraĵo. Ĉu en la kamparo ĉu en la urboj, ĉie videblas gajaj homoj. Jen petola "leono" salutas la homojn.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

INTER NI

Kiam niajn legantojn atingas ĉi tiu numero, la tuta Ĉinio estas banata en ĝojo de la Printempa Festo. Ĉi-jare la Printempa Festo estas en la 5-a de februaro, tamen la celebrado daŭras duonmonaton en iuj lokoj, precipe en la kamparo. Tiu komuna festo de multaj ĉinaj nacioj estas riĉaj je moroj kaj kutimoj. En nia februara numero legiĝas serio da artikoloj kun bildoj, kiuj detale konigas la feston.

La 20-an de decembro 1999 Makao, okupita de alia lando, revenis en la sinon de sia patrio. Post Hongkong ankaŭ tiu atentokapta evento markis la finon de humiliĝo de Ĉinio. "Makao Revenis!" konigas la ceremonion pri redono de la regpotenco, kiun partoprenis ankaŭ delegitoj de 53 landoj.

Iuj el niaj legantoj, kiuj iam ĝuis ĉinajn pladojn, deziras mem prepari unu aŭ du. La artikolo "Iom pri ĉinaj pladoj" ja estas verkita por kontentigi la bezonon de tiuj legantoj. En Ĉinio estas 4 gravaj kulinaj sistemoj, kies pladoj estas malsamaj en preparado kaj gusto, pro tio la nomita artikolo estas tro simpla.

La Red.

2[497]2000

Nova plano pri naturaj sciencoj de Ĉinio

“Ĉu ĉinaj sciencistoj havas projekton por Nobel-premio en la nova jarcento?”

de PING HUA

EN 1901, Nobel-premio naskiĝis. En la pasinta jarcento pli ol 460 sciencistoj ricevis la premion. Multaj landoj sendependiĝintaj antaŭ malpli ol 50 jaroj elkulturis almenaŭ unu Nobel-premiiton. 1999 estis la 50-jara jubileo de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Kvankam aperis 6 Nobel-premiitoj ĉindevenaj, tamen ili ĉiuj estas fremdlandaj civitanoj. Ĝis nun troviĝis neniu Nobel-premiito kreskinta en Ĉinio mem. Eble oni demandas: “Ĉu ĉinaj sciencistoj havas projekton por Nobel-premio en la nova jarcento?”

S-ro Chen Yiyu, vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, dediĉis sin al reformado de strukturo de sciencaj fakoj. Pri tio li prezentis sian opinion kaj konigis koncernan laboron.

Kial la ĉinoj ne akiris Nobel-premion? Laŭ analizo de specialistoj, la subaj kialoj limigis kulturadon de avangardaj sciencistoj.

1. Mankas novaj kreo kaj oftas sekvadoj de fremdaj esploroj.

2. Mankas scienca akumulo.

3. Mankas grupoj da sciencistoj.

4. Mankas mono por scienc-esplorado.

5. Mankas efika sistemo por elekti eminentajn sciencistojn.

Por krei bonan atmosferon utilan al sciencistoj en disvolvo de ilia genio, en 1998 Ĉinio



En laboratorio

lanĉis projekton por altigi nivelon de sciencoj kaj teknikoj. La projekto konsistas el du partoj, t.e. starigo de novaj sciencoj kaj kulturado de kompetentuloj. Se Ĉinio volas havi sian propran scienc-esploran sistemon, ĝi devas funkciigi konstruon por novaj scioj. Tiamaniere ĝi povas kuratingi avangardan nivelon de la naturaj sciencoj de la mondo. Por kontentigi la ŝtatan bezonon en la estonteco la Ĉina Akademio de Sciencoj dediĉas sian ĉefan atenton al vivsciencoj, biologio, informsciencoj, geo-dinamiko, prospektorado pri minaĵoj k.t.p. Koncerne kulturadon de sciencistoj, unue la ŝtato instigas eminentajn ĉinajn sciencistojn reveni el fremdaj landoj; due, ĝi firme subtenas bonajn sciencistojn, kiuj kreskis en Ĉinio. La projekto havas tri periodojn. En la unua ĝis 2000 la ŝtato konstruas 8 sciencajn

bazojn kaj subtenas trionon el la 30 miloj da sciencistoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. En la dua ĝi subtenos 20 milojn ĝis 2005 kaj post 2005 la akademio povos formi stabilan grupon el 30 miloj da sciencistoj. Krom tio estas ankaŭ aliaj 30 miloj da alispecaj sciencistoj, inkl. de postdoktoriĝaj sciencistoj, vizitantaj esplorantoj, doktoroj kaj magistroj. Tiuj 60 mil sciencistoj estos la ĉefa parto por ĉina naturscienca esplorado.

Laŭ statistiko de 1996, la elspezo por scienca esplorado konsistigis nur 0.5% de la totala nacia produktovaloru de Ĉinio. La procento estas malpli alta ol tiu de progresintaj landoj. La nuna stato serioze limigas disvolviĝon de ĉinaj sciencoj kaj teknikoj. Kompreneble la ĉina registaro ne povas asigni tiel grandajn monsumojn al scienca esplorado kiel la evoluantaj landoj, tamen ĝi jam promesis,

ke ĝi laŭeble pliigos la monsumojn por scienca esplorado kaj pliigos salajron de sciencistoj.

Laŭ nacia situacio la Ĉina Akademio de Sciencoj ne celas Nobel-premion en sia nova plano, sed por la ekonomia disvolviĝo de la tuta lando. Fakte Nobel-premio estas unu el la gravaj faktoroj por taksi la scienc-teknikan nivelon de iu ajn lando samkiel Olimpikaj medaloj por taksi la sportan forton. Tial dum disvolviĝo de ekonomio kaj reformado de scienca sistemo, Ĉinio volas fariĝi altnivela en iuj kampoj kaj elkulturi sciencistojn de Nobel-premio. En kiuj kampoj ekzistas tia ebleco?

S-ro Chen diris: "La Nobel-premioj estas donataj ĝenerale al bazaj sciencoj." Kiel veterana akademiano, li analizis la ĉinan sciencon fundamenton, bezonon en la estonteco kaj tendencon de mondaj sciencoj en la disvolviĝo.

La vivscienco estas grava. Ĉar Ĉinio estas granda agrikultura lando kaj havas grandan loĝantaron. En la nova jarcento 1.6 miliardoj da popolanoj devos vivteni sin, tial la vivscienco kaj biologia tekniko devas multe disvolviĝi.

Ĉar la 1.6 miliardoj da popolanoj konsistas el diversaj nacioj, kiuj donos gravan avantaĝon por eksperimenti pri speciala homa geno-grupo kaj klono. Sur tiu kampo ĉinoj eble atingos rimarkindajn sukcesojn.

Sur kampo de superkondukta fiziko, la teorio kaj eksperimenta nivelo de Ĉinio havas altan nivelon, dum la praktika teknologio estas malpli alta ol tiu de evoluantaj landoj, sed estas kredeble, ke la ĉinoj sukcesos en la estonteco.

Krome, ankaŭ en informadiko, astronomio kaj geoscienco Ĉinio havos brilan perspektivon. ■

Vojaĝu al Ĉinio okaze de la 50-jariĝo de EPĈ

Okaze de la 50-jariĝo de EPĈ ni organizos la "Vizit-grupon de EPĈ-amikoj". Ni proponas al niaj legantoj jenajn itinerojn:

Itinero I, Orienta parto de Ĉinio:

Pekino - Nankino - Suzhou - Hangzhou - Ŝanhajo (16-25 majo 2000)

La itinero komenciĝas de Pekino, kie troviĝas famaj antikvaj konstruaĵoj, kiaj la Granda Muro, Somera Palaco kaj Imperiestra Palaco. En Suzhou kaj Hangzhou estas la plej belaj ĝardenoj de Ĉinio kaj allogaj naturaj pejzaĝoj; kaj Ŝanhajo estas la plej prospera urbo de Ĉinio. Ĉi tiu itinero karakteriziĝas per kunfandiĝo de antikvo kaj moderna. Daŭro: 10 tagoj. Prezo: 400 USD/persono.

Itinero II, Silka Vojo:

Pekino - Xi'an - Lanzhou - Jiayuguan - Dunhuang - Turpan - Urumqi - Kantono (16-30 majo 2000)

Raportaĵoj pri la Silka Vojo aperis en nia gazeto en 1996-1998, kaj multaj el niaj legantoj montris grandan intereson. Laŭ la itinero vi vidos la falangon de terakotaj militistoj kaj militĉaroj, la okcidentan ekstremon de la Granda Muro, la misteran budhan kavernaron en Dunhuang, la senhoman dezerton kaj kolorriĉajn morojn de nacimalplimulto. Daŭro: 15 tagoj. Prezo: 1 500 USD/persono.

Itinero III, Tibeto:

Pekino - Chengdu - Tibeto (Zedang - Lhasa - Xigaze - Lhasa) - Kantono (16-30 majo 2000)

Tibeto, loko plena de beleco de neĝa altebenaĵo, kun mistera lamaismo kaj riĉa tibeta kulturo, ĉiam altiras al si interesitojn. Daŭro: 15 tagoj. Prezo: 1 960 USD/persono.


Mendu antaŭ la 15-a de aprilo 2000 ĉe la Distribuata Fakto de EPĈ.

Tel. kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto: epc@china-report.com

Majo estas la plej taŭga monato por turismo en Ĉinio, kaj ĉiu el la supraj itineroj estas rekomendinda. Ne preterlasu la ŝancon. Ni renkontiĝu en Ĉinio.

Redakcio de "El Popola Ĉinio"



Ĉinio estas lando de drako; drako ĉiam estas simbolo de la ĉina nacio

de YANG ZHEN

PRI la jaro 2000, iuj opinias, ke ĝi estas komenco de la 21-a jarcento, sed aliaj diras, ke ĝi estas fino de la 20-a jarcento. Kaj la distrumpetado de negocistoj furorigis la temon pri la nova jaro, antaŭ longe de ĝia alveno. Por la ĉinoj, la jaro 2000 ne nur signifas transiron de la malnova jarcento en la novan, sed ankaŭ estas jaro de drako, la plej granda mita besto kaj bonaŭgura animalo en la okuloj de la ĉinoj. La jaro de drako estas multe pli ŝatata ol la aliaj 11 jaroj.

Oni raportis, ke multe da novgeedzoj en la mondo preferas havi "jarcentan infanon", kaj novgeedzoj en la landoj havantaj bestajn jarsimbolojn pli preferas havi infanon en la jaro de drako. Do estas pli bone, ke ili nasku infanon depost la 5-a de februaro, ĉar tiu tago estas la unua tago de la jaro de drako laŭ la ĉina luna kalendaro.

TOTEMO DE ĈINIO

Okaze de festoj kaj grandaj celebradoj, ĉinoj ŝatas prezenti drako-dancon kaj tiu amuzo jam disvastiĝis al multaj lokoj de la mondo. Ĉe la komenco de la jaro de drako, oni certe ludas drako-dancon en la lokoj

koncentre loĝataj de ĉindevenaj homoj. Tia amuzo estas ofta, sed neniam enuiga. Ĉar ĉinoj prenas sin "posteuloj de drako", drako estas simbolo de la spirito kaj eterna totemo de la ĉina nacio.

Prauloj kutime prenis sangorilatan animalon aŭ naturan estaĵon kiel totemon kaj insignon de sia klano. Sed prauloj de la ĉina nacio totemigis drakon, kiu ne ekzistis en la reala vivo, tio restas enigmo, kvankam por ĝin solvi specialistoj multe penis.

Nemalmultaj homoj opinias, ke drako originis de serpento, ĉar la prauloj Fuxi, Nüwa, Huangdi k.a. en mitoj havis homan vizaĝon kaj serpentan korpon. La plej influa hipotezo estis elmetita antaŭ 50 jaroj. Tiu hipotezo pledas, ke en la klana epoko en la antikva Ĉinio la tribo kun serpenta totemo venkis multajn aliajn tribojn kaj asimilis partojn de la alitribaj totemoj kaj tiele formiĝis la "totema drako kun serpenta korpo, ĉevala kapo, cervaj kornoj, hundaj piedoj, fiŝaj skvamaro kaj antenoj".

Sed en la lastaj jaroj tiu ĉi hipotezo estis kontestita. Iuj opiniis, ke la batalo inter la primitivaj triboj estis kruela, kaj la venkinto ne povis esti tiel tolerema, ke li volontis asimili alies totemojn por pliriĉigi la insignon de sia tribo. Do ĉirkaŭ

1988, alia jaro de drako, oni levis novan diskuton pri la totemo. Iuj diris, ke krokodilo estis rudimento de la totema drako; aliaj opiniis, ke drako estis imagaĵo de prauloj inspiritaj de fulmotondro; triaj kredis, ke totema drako originis de apro; dum la kvaraj asertis, ke drako havas konsekvencajn rilatojn kun ĉevalo, fiŝo, silkraŭpo, tajfuno, nuboj k.a. Ĉiuj hipotezoj estis bazitaj sur historiaj materialoj aŭ arkeologiaj trovoj.

Sed ni flankenmetu la diskutojn pri deveno de la totema drako. Ni volas diri nur, ke drako en la ĝenerala koncepto de la ĉinoj estiĝis en Handinastio antaŭ ĉ. 2 200 jaroj. Sed en 1988, en la ruino de Yangshao-kulturo en Puyang de Henan-provinco, arkeologoj trovis drakon faritan el mitulaj konkoj antaŭ 6 000 jaroj, kiu jam portas la bazajn trajtojn de pli malfruaj drakoj.

SIMBOLO DE LA NACIO

Ĉe la origino drako jam estis strikte ligita kun multaj mitoj. Ekzemple la ĉaro de suno estas tirata de ses drakoj. La norda drako Zhu estas dio de lumo; la suda drako Ying estas dio de akvo kaj milito; la orienta drako Kui estas dio de muziko; drako Qing estas dio de orientiĝo

en intima rilato kun astronomio. Oni diris, ke drako naskis 9 filojn, kiuj havas diversajn hobiajn super muziko, sporto, justico, arkitekturo, religio k.a. Oni kredas, ke drako estas dio kun multaj kapabloj kaj prizorgas ĉion de la vivo de la homoj, nur ekskluzive de edzeco kaj amo. Por peti bonajn veterojn, la homoj faras drakon el papero por ke ĝi komuniĝu kun la vera, kaj de tio devenas la moro de draka danco. En la antikveco fiŝistoj en la malsupra baseno de Yangzi-rivero fortondis siajn harojn kaj tatus la korpon, por ke drako-dio prenu ilin siaj samspeculoj kaj ne damaĝu ilin. Oni faras konkurson de draka boato ja por distri drako-dion.

Drako patrolas sur la ĉielo komandante venton, nubon, fulmon kaj tondron, inspektas en maro, levante ondegon. Unuvorte, drako estas ĉiopova, variema kaj mistera. Antikvuloj do ofte diris, ke "oni povas vidi ne la tutan drakon, sed nur ĝian kapon", kaj pentristoj ŝatis pentri drakon ŝirmitan de nuboj, por akcenti ĝian misteron.

Konfuceo kaj Laozi estis kulturaj gigantoj antaŭ 2 500 jaroj. Foje Konfuceo vizitis Laozi kaj ĉi tiu konigis al li pri sia fiziologio kaj la kritiko kontraŭ la sklava sistemo. Konfuceo estis profunde inspirita kaj meditadis tri tagnoktojn. Li diris al siaj disĉiploj, ke Laozi similas al drako pro sia majesteco kaj mistereco. La familia nomo de Laozi estis Li, do poste homoj kun familia nomo Li pretendis, ke ili estas "ortodoksaj posteuloj de drako".

Drako estas simbolo de majesteco kaj nobleco, tial antikvuloj ofte komparis eminentulojn kun drako. Oni laŭdis homon kun elstara kapablo per vortoj "draka konduto", priskribis laŭtan kaj imponan sonon kiel "drakan muĝon", komparis viglan paŝadon kun "draka paŝado", belajn kaligrafiajn kun "draka flugo",

kaj ardan batalon aŭ intensan sportan konkurson kun "draka lukto"...

Pro la noblaj karakteroj de drako, la regantoj de diversaj dinastioj tre ŝatis dignigi sin per drako. Ekzemple Ying Zheng, la unua imperiestro de Qin-dinastio antaŭ 2 200 jaroj, nomis sin "praa drako", kaj la postaj imperiestroj nomis sin "vera drako kaj filo de la ĉielo", por plifortikigi sian reĝimon kaj timigi la popolon. En la lastaj du dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911) la imperiestroj monopoligis la uzon de draka figuro, ke la popolanoj ne rajtu uzi ĝin, sed la vestoj de la imperiestroj estis plene broditaj je draka desegno, kaj ĉie en ilia palaco estis desegnoj de drako. Kaj en la nuna Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino oni povas nombri 1 458 kolonojn skulptitajn je sennombraj desegnoj de drako, kiuj ornamis la tri ĉefajn halojn kaj iliajn bazamentojn.

Kvankam la kortegoj malpermesis al la popolo uzi la desegnon de drako kaj ankaŭ la ideogramon drako, tamen la popolanoj malgraŭe nomis montojn, riverojn, urbojn kaj eĉ infanojn per la ideogramo drako. Sur la mapo de Ĉinio oni povas nombri almenaŭ 499 loknomojn kun la ideogramo drako (neinkludite de malgrandaj lokoj), kaj la nombro de homoj kun nomo havanta la ideogramon drako ja estas nekalkulebla.

Ĉinio estas lando de drako. Drako ĉiam estas la simbolo de la ĉina nacio.

RAPSODIO DE JARO DE DRAKO

En la mezo de la 80-aj jaroj de la 20-a jarcento, furoris kanto "Posteuloj de Drako", kiu tekstas: "En la antikva Oriento estas drako, kaj ĝia nomo estas Ĉinio; en la antikva Oriento vivas homgrupo, kaj ili estas posteuloj de la drako..." En la

malnova tempo "posteuloj de drako" opiniis, ke la dua tago de la dua monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la tago, en kiu la drako vekigis kaj ĉielen flugas por peti pluvon, kaj tiu tago estas "draka festo". Por celebri la feston, oni manĝas tre maldikajn vermiĉelojn, kiujn oni komparis kun drakaj antenoj, amuzas sin per remado de draka boato kaj ludado de draka lanterno. Kaj en la nordo de Ĉinio kamparanoj verŝas sur grendraŝejon pajlocindron por desegni grentenujon simbolantan benopeton por riĉa rikolto. En la nuna tempo, "posteuloj de drako" havas la plej ardan deziron, ke la lando prosperiĝu kiel "giganta drako", kaj iliaj infanoj fariĝu sociaj elitoj.

El tio oni facile trovas, ke primitiva totema drako ankoraŭ vivas en la ideologio de la modernaj ĉinoj. Drako aperadas en iliaj kantado, dancado, kaligrafiaĵo, pentraĵo, literaturaĵo kaj aliaj flankoj. La antikva kulturo pri drako ankoraŭ havas vastan influon. Mirinde estas, ke en la orientaj landoj drako havas tre similan figuron, tute malsame al la okcidentaj landoj, kie la drako, simbolo de malbona forto, estas malbela kaj feroĉa.

Drako de Oriento estas afabla, nobla, brava kaj majeste bela. Ĝi povas grandiĝi kaj malgrandiĝi laŭ bezono, ĝi povas flugi al la ĉielo aŭ subteriĝi, kaj ĉiam restas aplomba ĉu en kulmina honoro, ĉu en serioza humiliĝo. Tia aplombeco estas tre valora en la nuna ŝanĝiĝema mondo. Kun tia karaktero drako povas persisti en sia strebado al la difinita celo. Tia nacio estas esperdona. En la lasta duonjarcento, alilandanoj ŝatis kompari Ĉinion kun drako. Tio unuflanke pruvas, ke la orienta drako jam estis konita kaj akceptita de Okcidento, kaj aliflanke montras la esperon de la mondo por Ĉinio kaj aliaj orientaj landoj. ■



La Ĉina
Jarcenta Altaro
— ejo por festi
la novan
jarcenton



Saluton, 2000!

Oni batis la jarcentan tamburon, ekbruligis sanktan flamon por la ĉina nacio kaj faris la jarmilan sonorigadon — la ĉinoj per siaj propraj manieroj bonvenigis la novan jarcenton kaj novan jarmilon

Teksto de BIAN JIBU

Fotoj de XIN HUA kaj ZHAO XI

KIAM la 20-a jc. adiaŭas nin kaj la dua jarmilo finiĝas, ankaŭ Ĉinio, kiu situas en la oka orienta horzono, enviciĝis inter la tutmondaj jubilaĵoj. Jen kelkaj scenoj.

GIGANTA DRAKO SUPER LA GRANDA MURO

La Granda Muro, serpentumanta 6 700 km, estas simbolo de la antikva ĉina nacio.

Pro tio la Granda Muro nepre devas esti destinita de ĉinoj kiel unu el la ejoj de celebrado de la jaro 2000.

La Granda Muro komenciĝas de Jiayu-pasejo en okcidento kaj

finiĝas per Shanhai-pasejo en oriento. Kiam Kiribato en Pacifiko la unua en la mondo eniris en la jaron 2000, Pekino estis en la 20-a horo de la 31-a de decembro 1999. Kaj ĝuste tiam kun bruo de tondra tamburado kaj gongado inaŭguriĝis la solena ceremonio "Atendi la Novan Jarcenton". Tiam unue ektondris en Jiayu-pasejo la 20 tamburaj formacioj el 2 000 homoj kaj la sono kondukiĝis orienten laŭ la 20 signalfajraj turoj kaj pasejoj de la Granda Muro, kiuj simbolas la 20 forpasintajn jarcentojn, kaj fine atingis sian celokon, la ĉefan kunvenejon en Shanhai-pasejo. Je unu minuto antaŭ nul horo de la unua de januaro 2000, la ĉinoj starantaj sur la Granda Muro, samkiel aliaj popoloj, alte tenante kandelon kune preĝis: "Eternan pacon al la homoj!"

Tiu parto de la Granda Muro

en Badaling, Pekino, kie kolektiĝis multege da homoj, estis hele prilumita. Tuj kiam la retrokalkula horloĝo montris nul horon de la unua tago de 2000, oni adiaŭis la malnovan jarmilon kaj salutis la novan per 20 salvoj.

Ankaŭ Juyong-pasejo en la nordokcidento de Pekino estis unu el la gravaj celebrejoj. Tie miloj da ĉinaj kaj alilandaj turistoj kun granda intereso rigardis drak- kaj leon-dancojn kaj ludon de petardoj. Post tio ili ĉiu kun drak-forma lanterno en la mano sin direktis al la supro de la muro. Brilis belaj lanternoj kaj dancis fajroj. La Granda Muro aspektis tre impona en la nokto.

ĈE LA ĈINA JARCENTA ALTARO

Nokte de la 31-a de decembro 1999, en la nove konstruita Ĉina Jarcenta Altaro en Pekino brilis sennombraj lanternoj kaj ondis maro da homoj. Senhalte saltis ruĝaj ciferoj sur la tabulo de hor-retrokalkulado. Por saluti la unuan tagon de la nova jarmilo ĉiuj ĉeestantoj estis emociitaj.

En la historio ĉinoj konstruis multe da altaroj por kulti la ĉielon, teron, sunon kaj lunon, dezirante favoran veteron kaj pacan vivon. Sed la Ĉina Jarcenta Altaro estas signo por bonvenigi la novan jarcenton en la antikva civilizita lando. Ĝi kovras 4.5 hektarojn kun plank-areo de 35 000 kvadrataj metroj. Ĝi fariĝis loko multe atentata de la tutlanda popolo. Tie okazis ceremonio de diversaj rondoj de la pekina popolo por celebri la novan jarcenton kaj novan jarmilon.

Hongkong-anoj bonvenigas la novan jarcenton.



La altaro konsistas el ĉefa konstruaĵo, bronza trairejo 270-metre longa kaj placo de sankta fajro. La ĉefa konstruaĵo el ŝtonoj similas al grandega sunhorloĝo, konsistanta el senmovaĵo "Tero" malsupre kaj turnebla tegmento "Ĉielo" peza pli ol 3 000 tunojn supre. Supre de la altaro staras metala montrilo 27.6 metrojn alta. Ĝi rekte sin direktas al la ĉielo kun la signifo de eterna tempo kaj senlima spaco.

Tiutempe ambaŭflanke de la bronza trairejo gravurita per vortoj pri la 5000-jara historio de la ĉina nacio kolektiĝis multe da homoj. La ĉefa konstruaĵo de la altaro tiam servis kiel grandega scenejo por dancado kaj kantado.

Je la 23-a horo kaj 48 minutoj Dabenna, mongol-nacia studento el la Pekina Universitato, alte tenante torĉon kun fajro, prenita en Zhoukoudian, loko de restaĵoj de pekin-homoj, kuris en la placon de sankta fajro tra la bronza trairejo, simbolanta tempon kaj spacon, eskortate de 8

knabinoj ĉiu kun girlando en la mano. Kiam la 20-a jc. havis nur 20 sekundojn, ĉiuj ĉeestantoj, ne povante reteni sian emociiĝon, unuvoĉe laŭtleĝis laŭ la retrokalkula horloĝo kune kun tondra tamburado. Je nul horo kaj nul minuto de la jaro 2000 Jiang Zemin, prezidanto de Ĉinio, premis la butonon de fajrigilo. Kaj ekbrilis la sankta fajro por eterne.

Samtempe kun tio, oriente de la altaro 19 reprezentantoj de diversaj nacioj kaj sociaj rondoj forte frapis jarcentan sonorilegon, kiu sonis 21-foje longe kaj laŭte. La sonorilo altas 6.8 m. kaj pezas 50 tunojn. Ĝi estis farita speciale por celebri la novan jarcenton. Sur ĝi estis gravuritaj vortoj pri gravaj historiaj eventoj de la ĉina nacio en la 20-a jarcento kaj bildoj de la Granda Muro, peonioj ktp.

Finfine venis la grava momento, markanta la komencon de la nova jarmilo. Ekbrilis la buntaj artfajraĵoj en la ĉielo,

leviĝis miloj da belaj balonoj, svingiĝis sennombraj brakoj kaj flirtis koloraj flagoj super la homa maro. En la malvarma nokto ĉiuj radiis de ĝojo, emocio kaj ekscitiĝo.

SALUTON, LA NOVJARMILA SUNO!

La tuta mondo estis atendanta la unuajn radiojn de la suno en la nova jarmilo.

Indiĝenoj de Kiribato blovis bukconon renkonte al la suno, plej frue leviĝanta super la horizonton. Antaŭ piramido de Egiptio kantisto laŭte kantis pri la suno kaj la



kanto daŭris de la lasta sunsubiro en 1999 ĝis la unua sunleviĝo en 2000. En la plej norda parto de Norvegio troviĝanta en la polusa nokto oni ne vidis la subirantan sunon en la lasta tago de la 20-a jc. nek la leviĝantan sunon en la unua tago de la 21-a jc., tamen la jubilantoj formiĝis en cirklo, esprimante koran bondeziron al la suno de la nova jarmilo.

Samkiel aliaj nacioj, ankaŭ la ĉinoj kultis la dion de la suno en la pratempo. Sur la argila vinujo, elterigita en loko proksima al Taishan-monto, orienta Ĉinio, legiĝas vortoj de antikvuloj, kiuj bruligis branĉetaĵon por kulti la sunon. Taishan ja estis ejo, kie oni kultis la ĉielon kaj sunon kaj nun ĝi estas enlistigita de Unesko kiel unu el la mondaj naturaj kaj

Oni vidas la unuan sunleviĝon en Hainan-provinco en la jaro 2000.





Studento kun
torĉo en la
Sankta Altaro

kulturaj heredaĵoj.

Noktomeze, ĉe Taishan-monto leviĝis nebulo kaj falis neĝo. Malgraŭ la frosto kaj glitiga vojo ĉ. 1 000 homoj ĉiu kun poŝlampo en la mano, kantante kaj ridante, iris al la montosupro, gvidate de la sankta flamo.

La suno donis vivon al ĉiuj kreskaĵoj. Oni kredis, ke plenumiĝos la benopeto sub la suno. En Hainan-provinco oni sin faligis kun fera bloko en la marfundon kaj tie formis el feraj pecoj ideogramojn kun la signifo "paco". En la "glacia urbo" Harbin oni ascendis glacian monton kun buntaj girlandoj en la mano kaj faris el ili kvinringan bildon, dirante, ke el la

kvin ringoj la ruĝa simbolas la sunon.

Kiel informite, en Ĉinio la loko, kie oni plej frue vidis la aŭroron de la nova jarmilo, estas urbeto Shitang. Frumatene de la unua de januaro, en tiu malgranda

ĉemara urbeto svarmis homoj atendantaj por rigardi sunleviĝon. Je la 6-a horo kaj 46 minutoj la ruĝo post la nuboj fariĝis pli kaj pli drasta, kaj finfine elmontris sin la ruĝa suno. Tuj sekvis varma aplaŭdo kaj hurao.

Post 3 horoj oni vidis la unuajn sunradiojn de la nova jarmilo en Urumqi, ĉefurbo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en okcidenta Ĉinio. Ĝi estas la lasta ĉina provinc-nivela ĉefurbo, en kiu oni plej malfrue vidis la aŭroron de la nova jarmilo.

La ĉinoj per diversaj manieroj bonvenigis la sunleviĝon en tiu aparta mateno kaj kun neretenebla ĝojo kriis al la brila suno: "Saluton, 2000!" ■

Bonvenigi la novan jarcenton sur la Granda Muro



Bovlo da supo

EN restoracio maljunulino aĉetis bovlon da supo kaj sidiĝis ĉe tablo. Subite ŝi rememoris, ke ŝi forgesis preni panon.

Ŝi iris por tio. Reveninte al la tablo, ŝi rimarkis, ke nigrulo okupis ŝian sidlokon kaj estas prenanta ŝian supon.

“Li ne rajtas preni mian supon.” pensis la maljunulino, “eble li estas tre malriĉa, do bone estas, ke mi silentas. Tamen mi ne povas lasi lin sola manĝi la tutan bovlon da supo.”

Do, ŝi sidiĝis ĉe la tablo vizaĝe al la nigrulo kaj ekmanĝis la supon silente.

Tiel ili alterne uzis la saman kuleron kaj formanĝis la supon en silento.

Post tio, la nigrulo stariĝis kaj venigis teleron da vermiĉeloj

kun du forketoj.

Ili daŭre manĝis. Fininte la manĝadon, ili stariĝis.

“Ĝis revido,” diris la maljunulino.

“Ĝis revido,” diris la samon la nigrulo, ĝoja kaj facila en la koro, ĉar li faris bonan aferon.

Nur post la foriro de la nigrulo, la maljunulino rimarkis, ke sur la najbara tablo estas bovlo da supo evidente forgesita. ■



Forgesemo

MALJUNAJ geedzoj estis ripozantaj eksterdome.

“Mi prenos glaciaĵon en la kuirejo. Ĉu ankaŭ vi volas ĝin?” demandis la edzo.

“Bone, mi volas glaciaĵo-bulon kun ĉokolado. Estas bone, ke vi notas tion per skribilo, ĉar vi estas forgesema.”

“Ne. Tion mi memoras. Glaciaĵo-bulo kun ĉokolado.”

“Jes, aldonu iom da juglanda kerno, ĉu vi memoras?”

“Kompreneble!”

“Krome, aldonu ankaŭ

ĉerizon.”

“Bone, bone.”

La edzino aŭdis, ke li laboradis dek minutojn en la kuirejo. Kaj fine li alportis du telerojn da omleto kun fumajita viando.

“Kion mi diris al vi?!” riproĉis la edzino. “Vi forgesis la bakitajn pantranĉojn.” ■



"Miela monato" en Esperantujo (II)

Post partopreno de UK, vi povas kompreni, kio estas amikeco, kio estas internacia familio

de PENG ZHENGMING

DU OTTOJ

Inter miaj germanaj amikoj estas du Ottoj. Mi nomas tiun, kiu loĝas en Duisburg, D-Otto, kaj la alian, kiu loĝas en Warstein, W-Otto. Antaŭe ili ne interkonis. En 1995, W-Otto vizitis Wuhan, kaj de ni trovis la adreson de D-Otto. Post tiam ili fariĝis amikoj.

En 1992, por celebri la 10-an datrevenon de ĝemeligo de Duisburg kaj Wuhan, la registara delegacio de Duisburg vizitis Wuhan. Antaŭ tio D-Otto, kunportante leteron de la urbestro, avangarde venis al Wuhan. Tiam estis la Printempa Festo de ĉinoj, kaj li gastis ĉe Wuhan-aj esperantistoj.

Ĉi-foje en mia vojaĝo en Germanio mi unue vizitis Duisburg kaj tranoktis en hejmo de D-Otto. Tie estas ĉambro speciale por akcepti samideanojn, kiu plenas de Esperantaj donacoj, fotoj kaj libroj. Tuj post mia atingo, D-Otto donis al mi la ŝlosilon: "De nun la ĉambro estas por vi." Akompanate de D-Otto mi trarigardis preskaŭ la tutan urbon, inkl. la ĉinan ĝardenon konstruitan de Wuhan-anoj.

La du Ottoj telefone diskutis kiamaniere min akcepti, tial geedzoj W-Otto facile renkontis min en malgranda stacidomo proksima al Warstein. 4 jarojn antaŭe, kiam ni interkonatiĝis, kiel komencantoj ili travojaĝis Ĉinion kaj Sudorientan Azion.



En la hejmo de D-Otto

Nun ili ne nur parolas flue en Esperanto, sed ankaŭ sperte organizas E-aktivadojn. Dank' al ilia klopodo, la nombro de esperantistoj en Warstein kreskis de 3 al 20, inter kiuj 7 partoprenis en la Berlina UK.

Antaŭ sia emeritiĝo W-Otto sin okupis per instruado en multaj jaroj, tial en la urbo ne mankas al li konatoj. Kune kun li mi ĝuis ĉie oportunon. Unu tagon post kiam mi atingis Warstein, ni vizitis bieran fabrikan, laŭdire la plej faman en Eŭropo. Ĉe nia atingo sur la granda elektronika ekrano antaŭ la fabriko aperis vortoj: "Bonvenon, s-ro Peng el Wuhan, Ĉinio!"

Geedzoj W-Otto estas respektive prezidanto kaj sekretario de iu Esperanta

filantropia organizo nomata "Bona Espero". Ili kolektis mondonacon por helpi orfan vilaĝon en montregiono de Brazilo, kie la infanoj lernas vivon, amon kaj Esperanton. Dum mia restado en Warstein, oni estis preparantaj varbadon de "Bona Espero" en la baldaŭa UK, kaj mi aliĝis al ili. Nokte ni ĝoje kolektiĝis en ĝardeno de W-Otto, kaj en la sekvanta tago 3 ĵurnaloj aperigis koncernajn fotojn.

La 31-an de julio, estis tempo por konfirmiĝo en UK, per du aŭtoj ni ekveturis al Berlino.

IMPRESO PRI BERLINO

Sur la vojo al Berlino, ni trapasis lokon, kie iam staris la

mond fama muro kun elektraj pikdratoj, kiu apartigis por 40 jaroj la samnaciajn parolantajn la saman lingvon. Ni vizitis ĝian ruĝon kaj piknikis apude. W-Otto rakontis al mi sian kontakton kun la kuzo loĝanta en la eksa Germana Demokratia Respubliko. La du landoj reunuiĝis antaŭ 10 jaroj, tamen ankoraŭ videblas postsignoj de apartiĝo laŭ la novaj kaj malnovaj domoj, vojoj, eĉ laŭ konversacio de homoj. Evidente estas malfacile forigi en mallonga tempo la nevideblan muron en la koro de homoj postlasitan de la historio.

Esperanto celas forigi ĉiun muron, kaj la ĉiujara UK estas bona ekzemplo. Ĝi diferencas de aliaj internaciaj kunvenoj plej klare per sia sentraduko. Plie ĝi estas popola interŝanĝo.

Estas malfacile priskribi la imponecon de la Berlina UK. Mia fotilo kaptis multajn kortuŝajn scenojn.

Dum la kongreso mi renkontis multajn malnovajn kaj novajn amikojn. Jene estas la fragmentoj:

Antaŭ la interkona vespero, iu stoplobarba junulo venis kaj diris al mi, ke li estas Pit el Nurenbergo; konfidite de s-ino Annie, prezidantino de la Nurenberga E-Asocio, li veturigos min post la kongreso al la suda Germanio.

Fakte ankaŭ s-ino Annie estis petata de mia invitanto s-ro Bernhard Maurer. Poste ŝi telefone montris sian bonvenon al mi.

La duan tagon de la UK, alia sinjoro informis min, ke s-ino Ina, ĝenerala sekretario de LKK, aranĝis por mi loĝlokon. Tio rememorigis min: Antaŭ la kongreso, en reto mi petis s-inon Ina serĉi por mi loĝlokon; ĉar tiam preskaŭ en ĉiuj berlinaj esperantistaj hejmoj estis enloĝigitaj gastoj, ŝi promesis respondi al mi poste. Tiel okupata pri la LKK-laboro, ŝi tamen ne forgesis mian bezonon.



Kun e-istoj de Warstein

Por rekomendi al juna brita esperantisto Demon instrui la anglan lingvon en Pekino, mi kunportis la invitleteron de la pekina registaro, intencante elsendi ĝin en Germanio al Demon. Sed mi forgesis kunporti lian adreson. Feliĉe mi estis trovita de la alia brito Ian Fantom, mia interreta amiko kaj konato de Demon. Dank' al lia helpo, mi finfine sendis la leteron al Demon, kiu nun laboras en Pekino.

En la kunveno de EPĈ-legantoj, maljunaj geedzoj Najbaro trovis min laŭ la kongresa libro. Ili estis miaj korespondantoj antaŭ dekelkaj jaroj. En tiu ĉi kongreso ni restarigis niajn interrilatojn.

Post partopreno de UK, vi povas kompreni, kio estas amikeco, kio estas internacia familio.

LASTA MOVIMENTO DE LA "MIELA MONATO"

Tuj post la kongreso, adiaŭinte la amikojn, mi ekveturis al Erlangen en la aŭto de Pit, tiel komencis mian postkongresan vojaĝon. S-ro Maurer atendis min.

En Erlangen estas pluraj E-

grupoj. La grupo de Maurer havas 4 membrojn. Ĉiufoje, kiam venas samideanoj, Maurer kaj liaj samgrupanoj kunlaboras por kontentigi la gastojn.

La renkontiĝo en Erlangen estis internacia: Krom la 4 grupanoj kaj mi, venis ankaŭ Pit kaj Frank el Nurenbergo, franca amiko de Frank, kaj sinjorino el Litovio. Ĝi vere estas granda internacia familio.

Mi provis portempe forlasi la e-istan rondon de Erlangen kaj trajne vojaĝis al Nurenbergo. Tie naskiĝis E-grupo la unua en la mondo. Kvankam en la urbo troviĝas multaj miaj konatoj, inkl. de Pit, tamen mi ne ĝenis ilin. Mi deziris havi mallongan solecon por min kvietigi post tiom da tagoj plenaj de varmega prizorgo. Miniature delikata, antikveca, fabeleca — jen tiel Nurenbergo impresis min.

La vojaĝo en Erlangen kaj Nurenbergo estis tiel ĝojoplena kaj malfacile forgesbla, ke ĝi fariĝis la lasta brila movimento de mia "miela monato". Rememorante tiujn tagojn, mi ne povas ne uzi la admiran vorton, kiun mia usona amiko Jakobo iniciatis: "Kia mondo! Kia lingvo!" ■

ĈINIO

● Por festi la 140-jaran jubileon de la naskiĝo de Zamenhof, la Ĉina E-Ligo kaj la Pekina E-Asocio kune organizis simpozion en la 11-a de decembro 1999. La simpozion ĉeestis pli ol 100 e-istoj el diversaj lokoj de Ĉinio kaj ankaŭ samideanoj el Britio, Islando, Koreio kaj Usono. Hou Zhiping, Laŭlum, Hang Jun kaj aliaj 4 samideanoj prelegis pri la centjara historio de Esperanto en Ĉinio, literaturo, lingvistiko kaj utiligo de interreto por E-movado. La simpozio estas ero de "Forumo de Sciencoj en 100 Jaroj", kiun kunorganizis la Pekina Federacio de Soci-sciencaj Asocioj kaj la Pekina Vespera Ĵurnalo. Intertempe oni okazigis simpoziojn pri filozofio, historio, ekonomiko kaj aliaj 9 fakoj. Antaŭ tio eldoniĝis libroj en serio "Ĉinaj sciencoj en 100 jaroj", inkl. de "100-jara ekzisto de Esperanto en Ĉinio". Posttagmeze de la sama tago okazis la 3-a kunveno de la membraro de la Pekina E-Asocio. (Wang Hanping)

● La 7-an de novembro 1999, ĉ. 30 e-istoj de Shenyang, Liaoning-provinco, renkontiĝis por bonvenigi s-inon Roben Mc Farland el Usono. Ŝi venis en Shenyang por labori kiel instruistino en iu profesia tekniko-trajna centro. En la renkontiĝo ŝi konigis al la ĉeestantoj la usonan E-movadon kaj sperton



S-ino Roben Mc Farland bonvenigata en Shenyang

pri siaj lernado kaj praktikado de Esperanto. Lüchuan-librejo de Shenyang donacis al ŝi Esperantajn eldonaĵojn.

(Li Liang kaj You Xusheng)

● Oktobre de 1999 okazis filatela ekspozicio en la gubernio Tonglu, Zhejiang-provinco. S-ro Bao Lin, prezidanto de la Tonglu-a E-Asocio, ricevis la unuan premion pro sia Esperanta filatelaĵo "Niaj amikoj troviĝas tra la tuta mondo". En ĝi estas du raraj poŝtmarkoj emisiitaj de Brazilo en la 30-aj jaroj. Ili estis senditaj de brazila e-isto al s-ro Bao per internacia ekspresa poŝto por la ekspozicio.

● Lastatempe eldoniĝis la "Ĉina-Esperanta-Angla Fervojo-Vortaro" kun pli ol dekmil vortoj, kompilita de s-ro Li Sen, prezidanto de la Ĉina Fervojista E-Asocio, kaj aliaj. 620 paĝoj. Formato: 787X1092 mm 1/16. Prezo: 10.00 USD (inkl. de la sendokosto). Adr.: Li Sen, Huhhota Tieluju Sushe 16-2, 010057, Huhhot, Neimonggu, Ĉinio.

(Wang Tianyi kaj Chi Tienan)

AŬSTRIO

● La E-redakcio de Radio Aŭstria Internacia ekde novembro 1999 funkciigas "Infanklubon". Membroj de la klubo povas esti infanoj malpli ol 15-jaraj kaj parolas Esperante. Se vi volas esti membro, sufiĉas rete sendi al la redaktoro vian ĝustan adreson, precizan naskiĝdaton kaj alskribas vian deziron esti ano de la infanklubo. Katinjo Fetes-Tosegi, redaktoro de la E-elsendoj, rete: katalin.tosegi@orf.at.

(Ret-info)

NEDERLANDO

● HEJMA VORTARO.

Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jouk Lindstedt. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1999. 63 p. 21 cm. Prezo: €7,50.

KULTURO KAJ SANO. Referaĵo por la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. Rotterdam: UEA, 1999. 42 p. 21 cm. Prezo: €5,40.

P O R A K T I V A LINGVOPOLITIKO. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 71 p. 21 cm. Prezo: €7,10.

Triona rabato ekde 3 ekz. de sama titolo ĉe la libroservo de UEA. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: +31 10 436 1044; Telefakso: +31 10 436 1751; Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

(UEA)

TOGOLANDO

● La 15-an de novembro 1999 s-roj Sagbadjelou Kokou kaj Attiogbe-Agbemadon B. Mensah, respektive prezidanto kaj respondeculo pri financoj de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE), franclingve gvidis ĉe la radiostacio Delta Sante de la urbo Aneho de Togolando elsendon pri Esperanto en unu horo kaj duono, kiu estis parto de programero "Grand Carrefour" (Granda Renkontiĝo) de la radiostacio. S-roj Kokou kaj Mensah skizis la historion de Esperanto kaj prezentis la E-movadon de Togolando. Multaj aŭskultantoj pridemandis la kondiĉojn de la lingvolernado, ties avantaĝojon kaj la planon de UTE por diskonigi Esperanton al la neesperantistoj. Ili klare kaj detale respondis diversajn demandojn.

(Sagbadjelou Kokou kaj Gbeglo Koffi)

La knaba venĝo

de JOVAN NEIC (Jugoslavio)

“**F**ILO mia,” per milda voĉo diris al mi la patrino, “iru mia filo, dum vi estas jam piedstaranta kaj vestita. Jen al vi la monon kaj forkuru ĝis la kooperativa vendejo por aĉeti petrolon kaj alumetojn.”

Ankoraŭ nun mi bone memoras tiujn vortojn, kiuj estis prononcitaj iun frostan januaron antaŭvesperon en 1943. Tiutempe mi estis lernanto de la kvara klaso de elementa lernejo, en la soleca montara vilaĝo, la naskiĝvilaĝo de mia patro. Ni enloĝiĝis ĉi tie el la urbo, en kiu ni vivis ĝis la Dua Mondmilito.

La flamo en la ronda fajrejo kraketis kaj vekis en mi deziron resti tie kaj aŭskulti iun interesan rakonton de mia patrino, kiun ŝi predikis al la ĉeestantaj najbarinoj. Ekstere fajfis montara vento, kiu kvazaŭ min admonus al mia devo. Mi prenis monon kaj ekiris al la kooperativa vendejo. Dekstre kaj maldekstre de mi estis konstruaĵoj, preskaŭ plenkovritaj kaj superŝutitaj per dikaj neĝtavoloj. Miloj kaj miloj da neĝflokaj petole vibradis kaj senĉese sinkis. Ĉi tie kaj tie aŭdiĝis nur hunda bojado kaj en tiu mallumo estas videbla eĉ neniu spuro de homo. Nenie viva estaĵo! Kiam mi alproksimiĝis al ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo, mi rimarkis jam videblan kooperativan vendejon, ĉar estis videbla ankaŭ la lumo de petrola lampo, kio ja estas signo ke vendisto estas ankoraŭ interne.

Kiam mi tute alproksimiĝis al la vendejo kaj aliris apud la muro, mi iom fikse aŭskultis kaj ŝajnis al mi, ke ĉio mutiĝis, ke interne estas neniu. “Grumbliŝ” nur per intermitaj sonoj malnova kooperativa radioaparato. Tiumomente mi estis opinianta: Jen! La vendisto forgesis elŝalti la radioaparaton.

Pro scivoleco mi provis malfermi la pordon. Mi restis konsternita, kiam mi — je mia granda surprizo — ekvidis plenplenan vendejon da homoj. Ĉiuj, kvazaŭ transformiĝis en unu oreton, aŭskultis radioinformojn (Radio Londono). Pordknare mi ne volis intence atentigi la aŭskultantaron.

“Kiu malfermas la pordon? Dian patrino al li!” Neatendite ekkriis iu uniformigita persono. Ekvidinte lin iom pli bone, mi rimarkis, ke tiu estas sinjoro Mitic, rotestro de la ĝendarmejo en la vilaĝo.

“Mi, estas mi,” preskaŭ timige mi respondis, “mi venis por aĉeti petrolon kaj alumetojn.”

“Eliru tuj eksteren, vi kanajlo kaj senvangulo! Mi ‘donos’ al vi petrolon; nun vi trovis tempon por aĉeti, kiam ĉiuj knaboj estas hejme.” Alproksimiĝante al mi, tiu severa ĝendarmo tirpinĉante miajn orelojn elvendejigis min.

Senrezulte mi revenis hejmen. Paŝon post paŝo irante survoje al mia hejmo, mi pensis pri la nehumana procedo de sinjoro Mitic. Mi estis profunde ofendita, kaj naskiĝis en mi ideo por venĝi min por la ofendo, kiun faris al mi tiu Mitic. Tiu ideo okupadis min senĉese de tago al tago. Kiamaniere tion efektiviĝi? — Estas grava demando. Ĉu tian ideon povas realigi 10-jara knabo, ofte mi demandis min. Fine, mi decidis: VENĜO.

* * *

Tempo pasis iom post iom, kaj jen antaŭ ni jam la printempo.

Tiutempe mi gardis kaj prizorgis unu kapron kaj kelkajn kapridojn. Ĉiutage, post la lernejoj horoj, mi paŝtis mian “gregon” ekster la vilaĝo en la paŝtejluko nomata “Plaŝivac”.

Iun tagon mi alarmis la vilaĝon kontraŭ soldatoj. Ne konjektante la motivon de tiu ĉi alarmo, sinjoro Mitic serĉis min kaj per maltrankvila

voĉo postulis, ke mi rakontu al li ĉion, kion mi vidis.

Sen multaj dilemoj mian rakonton mi prezentis jene:

Posttagmeze, ĉirkaŭ la 16-a, min trafis unu grupo da homoj, bone armitaj, ĉefe per pafiloj kaj mitraloj kaj sur la ĉevaloj estis 3 aŭ 4 mitraloj. Laŭnombre ili estis 60-70, bone vestitaj kaj sur la kapoj ili havis ruĝajn kvinpintajn stelojn. Ili sidis tie, apud la malnova kabano, ripozis, babilis, kantis, manĝis kaj ĉiam havis bonan humoron. Ili restadis ĉirkaŭ du horojn ĉi tie kaj foriris al la monto.

Post duonhoro, preskaŭ la tuta vilaĝo kolektiĝis. Alproksimiĝis antaŭvespero kaj la vilaĝa alvokisto daŭrigis alvoki vilaĝanojn. Unu post unu aŭ en grupetoj la homoj alvenis al la konata loko. Kiam laŭ la takso de s-ro Mitic la nombro sufiĉis, li invitis ilin ke ĉiuj alproksimiĝu al li kaj tiuokaze li sukcesis prediki “signifan paroladon”.

“Vi ĉiuj revenu hejmen, prenu stangojn kaj hakilojn kaj denove estu ĉi tie post duonhoro.”

Antaŭ la difinita limtempo, ĉiuj kapablaj estis surloke. Sinjoro rotestro tuj faris planon kaj al ĉiu sia ĝendarmo aldonis po kelkaj vilaĝanoj kaj tiel ĉiuj amase ekmoviĝis en la batalon kontraŭ partizanoj. Kiam ili eliris ekster la vilaĝo, la aliaj tie restis kiel gvardianoj ĝis la aŭroro.

Intertempe, sinjoro Mitic volonte esploris la terenon kun siaj tri kunlaborantoj kaj daŭrigis iom pli. Sed nenion rimarkinte, li falis en fosajon sufiĉe profundan kaj rompis al si la dekstran gambon. Feliĉe, liaj akompanantoj lin savis kaj kunportis ĝis la ĝendarmejo kaj de tie al malsanulejo. De tiam nia vilaĝo ne plu vidis tiun kruelan sinjoron Mitic.

Do, la venĝo efektiviĝis. Ĉu Dio min helpis, mi ne scias. Mi nur tre bedaŭras, ke niaj vilaĝanoj devis suferi kaj poste esti viktimoj de miaj neantaŭviditaj agadoj al s-ro Mitic. Tion mi ne antaŭvidis. ■

Teksto kaj fotoj de
CHENG WEIDONG

En la gubernio Ruto en la nordo de Ali de Tibeto estas Bangong-lago en absoluta alteco de 4 242 metroj. Ĝi longas 155 kilometrojn kaj larĝas 40-15 000 metrojn. De la oriento al la okcidento, la klara akvo en la lago estas laŭvice sensala, duonsala kaj sala. La lago estas punktita de grandaj kaj malgrandaj insuloj, kaj la plej renoma estas la Birda Insulo kun longo de 300 metroj kaj larĝo de 200 metroj. Sur la insulo kreskas nur malaltaj arbustoj kaj sur ĝia bordo nekonataj herboj. La mastroj de la insulo estas brunkapaj mevoj, kiuj, en grandeco de kolombo, havas brun-grizan kapon, nigran voston, blankan plumaron sur la korpo kaj grizan plumaron sur la flugiloj. La pinta beko estas ruĝa, ankaŭ la longaj stilzoj ruĝaj. Dank' al la printempa



Ovoj de brunkapaj mevoj

La Birda Insulo sur altebenaĵo

varmeta aerfluo de la Bengala Golfo, la altebenaĵo Ali havas bonan ekologian medion. Post vintrumado sur la sud-azia subkontinento la birdoj revenas

al la lago por generado.

Bangong-lago estas nepoluita parcelo de la naturo, kaj la Birda Insulo estas paradizo de la birdoj.



Fotado de brunkapaj mevoj.



Flugado



Sulca Birda Insulo



Protektado



Serĉo de manĝaĵo



Neĝo kaj brunkapaj mevoj

Makao revenis!

Mi emociiĝis ĝis larmoj, same kiel aliaj ĉinoj ĉeestantaj la ceremonion de repreno de la suvereneco de Makao, kaj mia pensado vigladis en granda emociiĝo. Mi kvazaŭ aŭdis elkoran huraon resonantan super la nokta Makao: "Panjo, mi revenis!"

Teksto de LI FUGEN

Fotoj de ZHAO XI

JE nul horo de la 20-a de decembro de 1999, halo en formo de granda ĉin-stila lanterno, kiu sidas sur marbordo de Makao, fariĝis fokuso de la tuta Ĉinio kaj eĉ la tuta mondo. En akompano de la muziko de la solena nacia himno de Ĉinio, la ruĝa kvinstela nacia flago estis hisita. Ĉina prezidanto Jiang Zemin proklamis reprenon de la suvereneco super Makao.

MEMORU LA MOMENTON

Ĉi tiun momenton la ĉinoj atendadis jam 446 jarojn. Ĉi tiu momento estis enskribita en la historion kune kun la atesto de la delegitoj de 53 landoj kaj 29 internaciaj organizoj kaj ankaŭ la membroj de la honora delegacio de la ĉina popolo. Starante sur la loko, kiun eksterlandanoj plej frue okupis kaj malplej frue redonis, mi emociiĝis ĝis larmoj, same kiel aliaj ĉinoj ĉeestantaj la ceremonion de repreno de la suvereneco de Makao, kaj mia pensado vigladis en granda emociiĝo. Mi kvazaŭ aŭdis elkoran huraon resonantan super la nokta Makao: "Panjo, mi revenis!"

2 horojn post tio, fondiĝis la Makaa Speciala Administra Regiono. Edmund Ho Hau-wah, la unua regiona ĉefo elektita de ĉinoj, ĵuris je sia enoficiĝo.

Malfermiĝis nova paĝo de la historio de Makao.

GRANDANIMECO DE LA ĈINOJ

Je la kvina posttagmeze de la 19-a de decembro de 1999 la 127-a kaj ankaŭ la lasta portugala makaa rezidanto de post la jaro 1623, Vasco Rocha Vieira, akceptis la malhisitan portugalan nacian flagon flirtintan super la Makaa Rezidentejo. Mi rimarkis, ke liaj okuloj estis humidaj. Li estis enoficigita en 1991 kaj en la pasintaj 8 jaroj li faris penadon por stabile kaj glate redoni la regantecon kaj lia faro estis aprobata de la ĉina kaj portugala instancoj. Kiam li estis foriranta de la rezidentejo, la ĉeestantoj adiaŭis lin per aplaŭdado.

Portugala regado super Makao multe suferigis la makanojn kaj la aliajn ĉinojn, sed al la sincereco de la nuna portugala instanco konforma al la epoko kaj en la kunlaborado kun Ĉinio la ĉinoj montris indan sintenon. En la ceremonio de redono de reganteco prezidanto Jiang Zemin diris: "La amikeco de la popoloj de Ĉinio kaj Portugalio kaj amika kunlaborado de la du landoj disvolviĝos sur la nova startpunkto." Kaj en la ceremonio de fondiĝo de la Makaa Speciala Administra Regiono li ripetis: "Estas laŭleĝe protektataj la interesoj de la posteuloj de portugaloj en Makao, estas respektataj iliaj moroj kaj kultura tradicio." "En

la estonteco, ĉiuj loĝantoj en Makao, sen distingo de raso kaj haŭtkoloro, ĝuos la ŝancojn de egalrajta konkurenco, kaj ĉiuj ĝuos la rajtojn kaj li-berecon garantiatajn de la leĝo."

Ĉiam ekzistis alternativo por solvo de la makaa problemoj, nome, paca kaj nepaca manieroj. Ĉinio longe suferis agreson, ofendon kaj humiligon de la potencaj landoj kaj tre amas la sendependecon kaj la pacan vivon malfacile akiritajn. Dum la procedo por solvo de la hongkonga kaj makaa problemoj, Ĉinio persiste praktikis la pacan manieron kaj elmetis la metodon "unu lando, du sistemoj". Glata solvo de la makaa problemoj refoje montris al la mondo, ke Ĉinio amas kaj defendas pacon kaj faris sin ekzemplo en pritraktado de internaciaj problemoj surbaze de konsidero pri la komunaj interesoj de la homaro.


JUBILADO DE LA POPOLO

Ŝajne vetero havis la intencon provi la entuziasmon de lokanoj pri reveno de Makao al la patrolando, kaj la temperaturo en kelkaj tagoj antaŭ la 20-a estis kompare malalta, sed tio neniom malhelpis la gajan etoson en Makao. Printempa etoso regis en Makao en decembro: ĉie vidiĝis ruĝaj naciaj flagoj, verdaj regionaj standardoj, afiŝoj kun la temo pri reveno de Makao kaj la evidenta ĝojo sur la vizaĝo de

中国政府
对澳门恢复行使主权
距1999年12月20日

倒计时

0天
00秒




Solena cerimonia por redoni al Cínio la suverenecon super Makao
Foto de MAO JIANJUN





- | | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 |
|---|---|---|---|

- 1 Drako-danco sur Tian'anmen-placo
- 2 Makaaj geknaboj festas la revenon de Makao
Foto de LI GANG
- 3 Makaanoj bonvenigas la garnizonon de sia lando.
Foto de ZONG JINZHU
- 4 Kantado



Studentoj de Pekino kun slogano
"Makao, hejmen" ĉe Tian'anmen-
pordego

Foto de QIAN XINGQIANG

maka-anoj...

Longe antaŭ la tago Makao jam estis ornamita per festa aranĝo. Ĉiuj taksioj havis paperan nacian flagon sur la karoserio, paperan nacian flagon kaj regionan standardon algluitan sur la malantaŭa glaco. En la 12-a, kiam mi enpaŝis en aviadilon de makaa flugkompanio, mi estis karesita de tia etoso. En la aviadilo mi hazarde renkontis 85-jaran sinjorinon Du Lan, direktoro de la mezlernejo Haojiang de Makao. Estis ŝi, kiu hisis la unuan ruĝan kvinstelan flagon en Makao riskante sian vivon, kaj de tiam la nacia flago flirtis 50 jarojn en Makao. En la 16-a mi venis al la mezlernejo por intervjui ŝin. Ŝi diris al mi, ke historia kurso kaj patriotisma edukado ĉiam estas la grava leciono en la lernejo. Por celebri la revenon de Makao al la patrolando, la


instruistoj kaj lernantoj de la lernejo preparis programerojn el blovmuziko, talitamburado, danco kaj kanto.

Makaon interligas 200-metra diĝo kun la dogano Gongbei de Zhuhai. Je nul horo kaj 17 minutoj, tuj post finiĝo de la ceremonio de redono de reganteco, multaj homoj, kiuj televidis la ceremonion, iris al Gongbei por rigardi enmarŝon de la ĉina garnizono en Makaon. Sed ili prenis la noktomezan horon por la tagmeza. Kia emocia eraro!

30 minutojn post 12-a tagmeze de la 20-a, la ĉina garnizono enmarŝis en Makaon kaj komenciĝis grandioza parado sub la titolo "Marŝo al pli bela morgaŭo". Sur la vojo en longeco de simbola cifero de 1 999 metroj, paradis 25 festoĉaroj, 26 amuzaj grupoj, 53 falangoj kaj pli ol 5 000 maka-anoj, en varma huraado

de dekmiloj da maka-anoj kun flagoj kaj floroj en mano. Ĉiu festoĉaro, ĉiu grupo kaj ĉiu falango estis rekompencataj de la rigardantoj per varma aplaŭdado. Kiam venis 56 geknaboj de la Lernejo de Infanoj de Laboruloj de Makao en vestoj de 56 nacioj de Ĉinio, la tri grandaj ĉinaj ideogramoj signifantaj "Reveno", kiujn la geknaboj subportis, puŝis la paradon al la kulmino. La nacimalplimultaj vestoj portataj de la geknaboj estis faritaj kaj donacitaj de emeritiĝintaj geedzoj en Hangzhou (ĉefurbo de Zhejiang-provinco en la oriento de Ĉinio). Ili mem faris tiujn vestojn en du jaroj.

Celebrado daŭris plurajn tagojn en Makao. Kiam mi forflugis de Makao al Pekino en la 23-a, mi trovis, ke celebrado de la popolo ankoraŭ daŭras en varma atmosfero. ■



Danco inter bambuaj stangoj ŝatata de li-aj gejunuloj

Jupo kaj kaptuko de li-oj

Fotoj de HUO JIANYING

Li-nacio loĝas sur Hainan-insulo en suda Ĉinio kaj nombras 800 mil membrojn. Ili parolas sian propran lingvon, kaj parto el ili, kiuj loĝas mikse kun han-oj, parolas ankaŭ la han-an. Antaŭ 1957 la li-oj ne havis skriblingvon kaj uzis la han-an. En 1957 la registaro helpis ilin krei sian skriblingvon bazitan sur


latinaj literoj.

La li-aj virinoj estas tre lertaj en teksado de jupo kaj kaptuko. Brokato de li-oj estas fortika kaj havas belajn desegnojn kaj brilajn kolorojn.

La li-aj virinoj portas senbutonan broditan ĵaketon, longan, mezlongan aŭ mallongan jupon kaj broditan kaptukon. Ili portas ankaŭ orelringojn, kolĉenon kaj braceletojn. Vestoj de viroj

estas kompare simplaj. La pli aĝaj viroj portas nigran aŭ bluan senkoluman jakon butonumatan antaŭ la brusto, kaj la kapharoj estas tuberigitaj antaŭ la frunto aŭ post la okcipito, dum la junuloj portas blankan aŭ flavan ĉemizon, ruĝan veŝton kaj ruĝan kaptukon. En iuj lokoj la supraj vestoj de la viroj kaj virinoj estas sendiferencaj, kaj ankaŭ la viroj portas orelringojn.





- 1 Li-aj knabinoj en naciaj vestoj
- 2 Broditaj juoj
- 3 Li-aj viroj en naciaj vestoj
- 4 Knabinoj promenantaj ĉe maro
- 5 Li-aj gejunuloj en festotago



“Muzikista Fojnbudo” en la Imperiestra Palaco en Pekino

Tio estis grandioza renkontiĝo de la kulturoj kaj artoj de Oriento kaj Okcidento

Teksto de HUANG XIUFANG
Fotoj de FENG JIN

Kiam radioj de la subiranta suno kisis Wumen-pordegon, la Imperiestra Palaco en Pekino estis atendanta eksterordinaran vesperon. Tie kolektiĝis ĉ. mil artistoj ĉinaj kaj aŭstriaj por prezenti programerojn en la vespero “Muzikista Fojnbudo” kune okazigita de la Ĉina Centra Televida Stacio kaj ORF (Aŭstrio) kaj preparata tri jarojn.

La vespero “Muzikista Fojnbudo”, lanĉita de ORF, okazis en multaj landoj kiel

fama TV-programero en Eŭropo. S-ro Karl Moik, unu el la TV-anoncistoj vaste ŝatataj en Eŭropo, diris, ke la “Muzikista Fojnbudo” en Ĉinio estas la plej partikulara el tiuj, kiujn li gvidis aliloke dum 18 jaroj. Li ege emociiĝis, ĝojis kaj fieris, ĉar tio estis grandioza renkontiĝo de la kulturoj kaj artoj de Oriento kaj Okcidento. 4 000 spektantoj el Aŭstrio, Svislando, Germanio kaj aliaj landoj venis en Ĉinion kaj igis la vesperon eksterordinara. Kaj la vespero estis telesendota de televidaj stacioj ĉina, aŭstria, germana kaj svisa en ora tempo.



Zhou Tao kaj Karl Moik



Spektantoj el diversaj landoj

Sur la bazo de la popolaj kaj naciaj trajtoj, la scenoj de la vespero estis viglaj, gajaj, favoraŭspiciaj kaj pompaj. La prezentado, kiu daŭris 3.5 horojn, montris ne nur la malsamajn stilojn de artoj de Oriento kaj Okcidento, sed ankaŭ diferencon de la historio, kulturo kaj estetiko de la du nacioj. Ĉina danco akompanata de gamosonorilaro el la periodo de Militaj Regnoj (475-221 a.K.), muziko ludata per ĝeng-o, akrobataĵoj, batal-arto de Shaolin, tamburado de Jiangzhou kaj aliaj programeroj prezentis la longhistorian kulturon de Ĉinio; la kanto "Trisch-Tratsch-Polka" prezentita de la Infana Ĥoro de Vieno, kiu havas historion de pli ol 500 jaroj, montris la sanktecon, luksecon kaj ĉarmon de muziko. Hansi Hinterseer, mondĉampiono de skiado du-foje en la Vintraj Olimpiaj Ludoj kaj vaste ŝatata de eŭropaj spektantoj pro la kanto "Ĉu vi ne kisas min hodiaŭ?", per kiu li ĝuigis ankaŭ ĉinajn spektantojn.

Valso, baletto, "Blua Danubo", draka lanterno, leona danco kaj "Jasmena Floro" en malsamaj formoj de arto harmonie prezentigis sur la sama scenejo, same kiel dum provludo ĉina artisto volis provi saksofonon pro scivolemo, kaj skia ĉampiono el Aŭstrio multe interesiĝis pri ĉina akrobataĵo. Artistoj el la du landoj deziris interŝanĝon pri artoj kaj kulturoj. En la komenco de la vespero kvar grupoj el artistoj ĉinaj kaj aŭstriaĵoj alterne sursceniĝis sub sialanda muziko ludata per instrumentoj ĉinaj kaj okcidentaj. Kaj sur la scenejo kaj inter spektantoj regis atmosfero paca, varma kaj gaja. Ĉiuj ĉeestantoj emociiĝis kaj ĝojis, ĝuante la programerojn prezentitajn de artistoj de malsamaj etnoj kun malsamkolora haŭto en la Imperiestra Palaco kun historio de ĉ. 600 jaroj.



Kantado de
s-ino
Geraldine
Olivier



Montrado de naciaj vestoj de Ĉinio



Dancado de aŭstriaj artistoj





Aŭstria danco akompanata de muziko

Batal-arta teatraĵo

"Do Re Mi", prezentata de malgrandaj ĉinaj aktoroj kaj aŭstria artistino




“Karnavalo” sur la Leŭsa Altebenaĵo

Ĉio estas kovrita de neĝo kaj glacio, tamen klare senteblas espero kaj ĝojo, ĉar baldaŭ venos la Printempa Festo



Fajraĵo



Festantoj kun lanternoj

Teksto kaj fotoj de HUANG FU

VINTRE sur la vasta Leŭsa Altebenaĵo en la nordokcidenta parto de Ĉinio ĉio estas kovrita de neĝo kaj glacio, tamen klare senteblas espero kaj ĝojo, ĉar baldaŭ venos la Printempa Festo.

La Leŭsa Altebenaĵo estas lulilo de la ĉina civilizacio. Tie oni povas ĝui multajn antikvajn amuzaĵojn eĉ hodiaŭ, fakte oni plej alte taksas la Printempan Feston. Ĉiujare tuj post la komenco de la 12-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro oni fariĝas tre okupita. Tia okupiteco daŭras ĝis la antaŭvespero de la Printempa Festo, t.e. novjara festo laŭ la ĉina luna kalendaro. Kaj ekde la festo oni portempe ĉesigas ĉiujn kampajn kaj hejmajn laborojn kaj povas laŭvole sin distri, kio daŭras de la unua tago ĝis la 16-a de la unua monato. Tio estas la tiel nomataj okupiĝa 12-a monato kaj distra unua monato.




Gajaj festantoj en korto

OKUPIĜA 12-A MONATO

En la 12-a monato plej okupitaj estas virinoj. Tiam ili sin okupas en preparoj de manĝaĵoj kaj vestoj kaj purigo de domo kaj mebloj. Ili muelas tritikon kaj sojfabon por fari vaporumitajn panojn, toŭfuon, rizvinon kaj farunajn fritiĵojn... Unuvorte, ĉiuj bongustaĵoj devas esti preparitaj antaŭ la Printempa Festo. En la festo ĉiuj portas novan veston, precipe la infanoj, kiuj portas ne nur novajn jakon kaj pantalonon, sed ankaŭ novajn ĉapon kaj ŝuojn, kaj la knabinoj ankaŭ novan harligan rubandon. Tiam la infanoj portas surdorse amuleton el jujubo, milia tigo kaj kupra monero.



La 8-an de la 12-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro la tieaj homoj solenas la Grenan Feston. Laŭkutime, tiutage oni manĝas manĝaĵon el glueca rizo, jujuboj kaj vigno (*Vigna cylindrica*). Oni ne nur mem manĝas



Papertondaĵoj sur fenestroj



Ludo de suona



Neĝo ĝustatempe anoncas alvenon de la nova jaro.



Ŝi donacis amuleton al nepino.



Folkloro prezentado



La Lanterna Festo en nokto



Jujuboj por gastoj

tian manĝaĵon, sed ankaŭ donacas ĝin al najbaroj, metas iom da ĝi sur arbojn proksime de la domo, nutras per ĝi kokon, hundon, katon, porkon, azenon, bovon, ŝafon kaj aliajn kortobirdojn kaj kortobestojn, kio aludas universalan ĝojon kaj prosperon de la fruktarboj, grenoj kaj dombestoj en la nova jaro.


En la 23-a de la 12-a monato oni kultas la kuirejan dion kaj manĝas vermiĉelojn el miksaĵo de diversaj farunoj. La vermiĉeloj estas tre longaj, kio aludas feliĉon por longa tempo. En la sekvanta tago oni komencas purigi la

domon, meblojn kaj manĝilaron, fari papertondaĵojn, pendigi novjarajn pentraĵojn kaj tondi harojn por eniri tute pura en la novan jaron.

Antaŭvespere de la Printempa Festo ĉio estas preparita kaj oni certe faras kul-ton al siaj prapatroj antaŭ ties tomboj. Tiam oni ankaŭ balaas korton, algluas vers-paron sur pordo kaj pendigas ruĝajn lanternojn. Tiun vesperon oni verŝas vinagron sur ardan karbon, por ke la vinagra vaporo saturu la tutan domon, kio aludas forpeli ĉian malbonon. Kaj moderna scienco pruvis, ke tio estas efika

por desinfektado. Post la vespera krepuskiĝo, gvidate de maljunuloj, la junaj homoj adorkliniĝas antaŭ la dia niĉo, incensas al ĝi kaj post tio infanoj ĝoje eksplodigas petardojn.

Tiutage oni enlitiĝas malfrue. La tutan nokton oni ne malŝaltas lampon kaj en kaldrono ĉiam estas manĝaĵoj, ĉar oni opinias, ke tio aŭguras, ke en la venonta jaro oni havos sufiĉe da manĝaĵoj. Maljunuloj grimpas sur montopinton por rigardi al la oriento, ĉar ili opinias, ke tiamaniere ili povas diveni la rikolton kaj feliĉon en la venonta



Muelado

jaro laŭ lunradioj.

DISTRIGŔO EN LA UNUA MONATO

En la sekvanta tago oni ellitiĝas tuj ĉe la tagiĝo. Antaŭ ĉio oni eksplodigas petardojn, kio aludas feliĉon ĉe la pordmalfermo. Post tio la maljuna generacio faras ceremonion por bonvenigi diojn kaj akcepti kuirejan dion en la hejmo. La infanoj eldomiĝas

por fari novjaran saluton al la pliaĝuloj. Tiam la homoj de juna generacio esprimas bondeziron pri bona sano al la maljuna generacio. Tie estas stranga kutimo, ke maljunaj homoj de malalta klana hierarkio diras al infanoj de alta klana hierarkio: "Bonan sanon al vi, onklo!" aŭ "Bonan sanon al vi, avo!"

kaj la infano de alta klana hierarkio respondas al la maljuna homo de malalta klana hierarkio: "Saĝa kaj obeema estas vi, mia infano!"

Novjara saluto per *jangge*-danco estas la loka moro. Tia aktivado originis de antikva kultado. Origine, ĉiu *jangge*-dancanto estas reprezentanto de iu dio aŭ stelo. La ĉefdio estas rolata de prestiĝa maljunulo aŭ gvidanto de religia societo. Li iras fronte de la dancantoj kaj

respektoplene vizitas templon por kulti dion kaj peti favoran veteron en la venonta jaro kaj poste faras novjaran saluton al la samvilaĝanoj. En ĉiu familio la ĉefrolulo improvizas tekston de kanto por esprimi novjaran bondeziron al ili, dume eksonas tamburo kaj aliaj muzikiloj, kantas ĉiuj dancantoj kaj la mastro regas la gastojn per jujuboj, arakidoj, melonsemoj k. a. En tiu amuzaĵo ĉia malkonkordo inter la najbaroj forvaporigas.

La 5-an de la unua monato oni forĵetas iom da polvo de la terlito, aludante forĵeton de malriĉo. Oni intence faras trueton al fenestra papero kaj poste ŝtopas ĝin, kio aludas plenigi la malriĉan truon. La loĝantoj de la Leŭsa Altebenaĵo ripetas tian aktivadon, dezirante feliĉan vivon en la venonta jaro jam de multaj generacioj.

Eksplodigo de petardoj por adiaŭi la forpasantan jaron





En novjara festo

Laŭdire, la dekan de la unua monato estas tago, kiam ratoj edzinigas sian filinon. Tiutage oni prenas vespermanĝon antaŭ sunsubiro kaj post sunsubiro ne devas aŭdiĝi tintado de manĝiloj kaj kuiriloj, por ne ĝeni la ratojn. Maljunulinoj diras al infanoj, ke estas tre amuza la edzinigo de filino far ratoj kaj tiam, se oni grimpas sur tegmenton kaj atente aŭskultas ĉe fumtubo, oni certe aŭdas belan trumpetadon.

Estas ege amuze en la 15-a de la unua monato. Tiun nokton preskaŭ ĉiam brilas hela luno sur la ĉielo kaj la danco-trupoj de diversaj vilaĝoj eniras en la urbeton. Antaŭ ĉio sur placo oni faras zigzagan batalan formacion el sorgaj stangoj kaj metas sur ilin olelampojn el argilo. Se oni sukcese eliras el tiu

labirinta formacio, tio montras, ke en la venonta jaro oni estos en paco kaj feliĉo, tial ĉiuj konkure partoprenas la ludon. Post vespera krepuskiĝo ekbrilas la lampoj, eksonas tamburado kaj eksplodas petardoj. Gvidate de *jangge*-dancantoj, oni komencas la ekscitiĝan trairadon inter la lampoj. Tiutempe iuj junaj edzinoj ŝtelas lampon, kredante, ke sukcesinte en tio, ili povas naski filon. Tiam la lanternistoj intence krias: "Ŝtelu lanternon por naski filon!"

Tie vidiĝas ankaŭ antikvaj artfajraĵoj. Oni uzas blovilon por ardigi la fajron kaj likvigi feron kaj kupron. Post tio oni verŝas la likviĝintajn feron kaj kupron sur tabulon plenan de malseka sablo kaj rapide ĵetas ilin supren. Jen la nokto sur

la Leŭsa Altebenaĵo fariĝas luma de belaj fajraĵoj.

Tiam sub la lumaj fajraĵoj muzikistoj gaje ludas tradician blovinstrumenton kun fermitaj okuloj kaj la aŭskultantoj ĝuas, starante, sidante aŭ kaŭrante.

La fajra pagodo el karbopecoj brulas la tutan nokton antaŭvespere de la Printempa Festo kaj la tutan nokton de la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, t.e. la Lanterna Festo. Oni diris al mi, ke tio estas moro de primitivaj homoj. Vespere de la 16-a de la sama monato oni bruligas fajron meze de la korto kaj ĉiuj familianoj transsaltas la fajron. Oni kredas, ke transsaltinte la fajron, oni povas esti ĉiam sana dum la tuta jaro. ■

Moroj pri la Printempa Festo de Ĉinio

- Printempa Festo, la novjara festo de ĉinoj, estas la plej grandioza en Ĉinio
- En la pasintaj jarmiloj formiĝis tre diversaj moroj pri la Printempa Festo
- Plejparto de la ĉinoj preferas marki komenciĝon de la nova jaro per la Printempa Festo

de PANG BIAN

ĈINOJ havas du novjarajn festojn. Unu estas la unua de januaro laŭ la suna kalendaro kaj la alia — la Printempa Festo, en la unua tago de la unua monato laŭ la luna kalendaro. Ĝi estas je pli ol 30 tagoj malpli frua ol la novjara festo laŭ la suna kalendaro. Ĉijare la Printempa Festo estas en la 5-a de februaro. La ĉinoj ekhavis la novjaran feston de la suna kalendaro en la komenco de la pasinta jarcento, sed ili pli preferas, ke la Printempa Festo estu la vera novjara festo.

PRINTEMPA FESTO KAJ LA LUNA KALENDARO

En la antikveco la tempo de “jaro” estis determinita laŭ la periodo de kresko de grenoj. Unufoja maturiĝo signifis unu jaron. Poste, por pli bone aranĝi terkulturadon, la homoj komencis determini sezonojn laŭ astronomia observado. En Xia-dinastio antaŭ 3 000 jaroj aperis la luna kalendaro. Laŭ tiu kalendaro unufoja kresko-malkresko de la luno faras unu monaton, kaj 12 monatoj — unu jaron. La tago, en kiu la luno tute ne videblas, estis difinita kiel la unua tago de la monato, kaj la nova jaro komenciĝas de la noktomezo de la unua tago de la unua monato.

Ĝenerale dirite, la Printempa Festo estas nur en la unua tago



Leondanco

de la jaro. Sed fakte en la lasta monato de la jaro la homoj jam komencis sin prepari por la nova jaro, tial la Printempa Festo fariĝis la plej grava kaj plej longdaŭra festo de la ĉinoj.

PRINTEMPA FESTO KAJ “KULTA MONATO”

La lasta monato estas alinomata “kulta monato”. Esplorado pri la historio montras, ke prauloj kultis prapatrojn kaj diversajn diojn en tiu monato, do oni nomis tiun monaton “kulta monato”.

En pratempo la produktopovo estis tre mizera, kaj la prauloj tute ne povis mastri sian sorton, do ili prenis kiel diojn la naturaĵojn, kiuj povis influi aŭ decidi la rikolton. En jarfino, post ĉiuj kampaj laboroj, la prauloj faris “jarfinan kultadon”

por danki la prapatrojn pro ilia patrono kaj la diojn de la naturo pro ilia favoro kaj peti bonan rikolton en la venonta jaro.

La prauloj kultis multajn diojn. Krom dioj en la naturo, la prauloj kultadis ankaŭ multajn aliajn diojn en la hejmo. La unua kultata dio estis “hejma dio”, nome la spiritoj de la prapatroj de la familio. Iliaj nomoj estis skribitaj sur ligna tabuleto, kiun oni metis en niĉon sur la fronta muro de la sideoĉambro. Ambaŭflanke de la tabuleto estis dio de riĉeco kaj avalokiteŝvaro. Krom tiuj dioj, la prauloj kultis ankaŭ pordodion, kuirejan dion, litodion, fartodion... Unuvorte, la prauloj vivis inter amaso da dioj kaj ĉiuj dioj estis kultendaj. La lasta monato fariĝis la plej okupiĝa pro diversaj kultadoj. Iom post iom la homoj ankaŭ faris diversajn amuzadojn tra la tuta

lando krom kulti prapatrojn kaj diojn. Kaj jam en Han-dinastio antaŭ 2 000 jaroj, tute populariĝis la tutlanda festado de la lasta monato. Tiam la registaro ŝatis, ke la popolo havu belajn vestojn, abundajn manĝaĵojn kaj plezuran festenon, por manifesti la prosperon de la lando. Hodiaŭ la kulto al dioj jam arkaikiĝis aŭ ŝanĝiĝis en la enhavo, ekzemple purigi la domon, pendigi novjaran pentraĵon kaj versparon, eksplodigi petardojn, maldormi tra la lasta nokto de la jaro, saluti parencojn kaj amikojn, distri per drako- kaj leondancoj... Tiu moro herediĝis ĝis nun, kaj ĝenerale kultado al dioj jam turniĝis en amuzadon de la popolo.

LA OKA DE LA KULTA MONATO, ANTAŬFESTO, PURIGADO

La prauloj komencis la vintran kultadon en la 8-a de la 12-a monato, kaj nomis tiun monaton "kulta monato".

La difino de tiu dato ŝajne estis influita de budhismo, ĉar en tiu tago nirvaniĝis Ŝakjamunio. Laŭdire, foje antaŭ la budhiĝo Ŝakjamunio iris en varmega tago kaj falis svene de malsato. Knabino paŝtanta ŝafojn savis lin per kaĉo el diversaj grenoj. Budhanoj kredis, ke la kaĉo estis dia kaĉo kaj povis ilumini homojn, kaj ekhavis la kutimon preni tian kaĉon en la 8-a de la kulta monato kaj oferi ĝin al budho. Poste tiu ekzota religia festo koincidis kun la 8-a tago de la "kulta monato", kaj la homoj preparis kaĉon el diversaj grenoj, sed ili uzis tian kaĉon por kulti la agrikulturan dion kaj peti riĉan rikolton en la venonta jaro.

En Qing-dinastio (1644-1911) tiu moro pli furoris. En tiu tago la kortego donacis la kaĉon al la korteganoj kaj servistaro en la palaco, kaj disdonis al la grandaj temploj diversajn grenojn kaj fabojn, por ke la temploj

pretigu tian kaĉon. La prauloj prenis la 8-an de la monato kiel komenciĝon de la novjara festo, kaj en fakto de tiu tago komenciĝis la Printempa Festo.

Kutime oni prenis la unuan tagon de la unua monato kiel la grandan novjaran feston kaj la 23-an de la "kulta monato" kiel la malgrandan novjaran feston, aŭ "antaŭfeston". En tiu tago oni kultis la kuirejan dion, delegiton de la ĉiela imperiestro por kontrolo de la konduto de la homoj, kaj en la 23-a de la monato li devis iri al la ĉiela imperiestro por raporti pri la faroj de la homoj, kaj la ĉiela imperiestro premiis aŭ punis la homojn laŭ lia raporto. Tial la homoj devis regali la kuirejan dion per abunda festeno, por ke li faru favoran raporton.

La figuro de la kuireja dio estis ksilografie presita sur kolora papero kaj gluita supre de forno, kaj ambaŭflanke estis distiko "Sur la ĉielo raportu favore; sur la tero kontrolo feliĉige".

Post la malgranda novjara festo oni devis fari purigadon. Ĝi originis de antikva ekzorco celanta forpeli malsanon. En Ming-dinastio (1368-1644) purigado estis difinita kiel unu el la ritoj. Oni faris purigadon ne nur por bonvenigi la diojn, sed ankaŭ por forbalai malfeliĉon. En la lasta tago de la malnova jaro kaj unuaj tri tagoj de la nova jaro oni ne faris balaadon kredante, ke balaado forbalaos ankaŭ riĉecon kaj feliĉon.

ADIAŬI MALNOVAN JARON EN KRAKADO DE PETARDOJ

En la lasta nokto de la jaro oni havis plej multon por fari. Praeloj kredis, ke noktomezo, la alterno de la malnova jaro kaj la nova, decidas la feliĉon aŭ malfeliĉon de la familio. Tial oni gluis sur la pordklapoj bildojn de tigro aŭ pordodio, por ke ili defendu la domon kontraŭ diabloj.

La membroj de la familio devis kolektiĝi kaj atendi ĝis noktomezo por ricevi de ĉielaj dioj riĉaĵojn kaj bonvenigi la diojn. Tiam oni devis diri nur bonaŭspiciajn vortojn kaj absolute ne la vorton "malriĉo", nek insulti infanojn...

Vespermanĝo de la lasta tago de la malnova jaro devis esti tre abunda. La familioj povis havi malsamajn menuojn, sed nepre devis havi *ĝjaŭzi*-ojn (farunaj buloj farĉitaj per haketita viando). Kiam batis noktomezo, oni devis preni *ĝjaŭzi*-ojn kaj eksplodigi petardojn. Krakado de petardoj ofte daŭris ĝis tagiĝo.

Petardo originis de iluminaĵo uzata de antikvuloj. Antaŭ 2 000-3 000 jaroj, por prilumi korton, prauloj bruligis bambuajn cilindropecojn surverŝitajn per oleo. Dum brulado la bambuaj cilindroj krakadis, kaj tio povis fortimigi bestojn. Poste oni inventis pulvon. Oni enigis pulvon en kartonajn cilindrojn kaj bambuajn cilindropecojn kaj ŝtopis ilin per paperbulo. Oni eksplodigis la cilindrojn kaj la bruo estis tre granda. Poste tiu faro fariĝis kutimo por forpeli diablojn kaj bonvenigi feliĉon.

Tuj post manĝo de *ĝjaŭzi*-oj, oni eliris por viziti kaj gratuli aliajn. En la unua tago de la nova jaro oni salutis la gepatrojn, en la dua la bogepatrojn kaj en la tria aliajn parencojn kaj amikojn. Salutante la gepatrojn kaj bogepatrojn, oni devis genuiĝi kun kapo klinita ĝis la planko. Tiu salutmaniero devenis de antikva vivmaniero, ke en la antikveco prauloj sidis, kuŝis kaj dormis sur mato. Oni sidis kun interkrucitaj kruroj aŭ sur la genuoj. Antaŭ 1 800 jaroj aperis tablo, seĝo kaj lito, la homoj jam ne bezonis sidi aŭ dormi sur mato, kaj genuiĝo fariĝis maniero nur por esprimi respekton de juna generacio al la maljuna aŭ de humiluloj al altranguloj. En Ĉinio genuiĝo jam estis arkaika. Nun la homoj intersalutas ĉe la novjara festo per vizito, novjara karto, telefono aŭ retpoŝto. ■

Novjara festo de ĉinaj nacimalplimulto

En Ĉinio vivas 55 nacimalplimulto, kaj escepte de la tibeta, taj-a kaj kelkaj aliaj nacioj, kiuj havas sian propran kalendaron kaj novjaran feston, ĉiuj nacimalplimulto havas la Printempan Feston preskaŭ saman kiel tiu de Han-nacio, nur kun malgranda vario

de SHAO MIN

LA mongola nacio nomas la unuan monaton de la nova jaro “blanka monato”, ĉar la nacioj opinias, ke blanka koloro estas bonaŭspicia, kaj oni supozas, ke la ŝato de blanka koloro originas de ilia kutimo de prenado de blanka lakto kaj laktaĵoj. Antaŭ la festo la nacioj devas pretigi por si novan mongolstilan robon, viandon de unujara virŝafo, laktaĵojn kaj kelkajn vazojn da bona vino. Post tio ili devas pretigi ankaŭ ĉevalojn. Antaŭvespere de la nova jaro la tuta familio kunsidas en la mezo de jurto, festenas en noktomezo, aŭskultas kantorakontadon de artisto kaj maldormas la tutan nokton. Frumatene de la unua tago de la nova jaro, la nacioj en novaj vestoj rajdas sur ĉevaloj por viziti parencojn kaj amikojn. Gejunuloj do kaptas la ŝancon por fari ĉevalkonkurson.

Ĝuang-nacio, kies plejparto loĝas en la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, estas la plej granda nacimalplimulto de Ĉinio. La plej tipa manĝaĵo por la nacio en la novjara festo estas *zongzi*-o. Oni volvas 5 kilogramojn da glueca rizo, 1 kilogramon da porkaĵo kaj 1.5 kilogramojn da radiato (*Phaseolus radiatus*) per grandaj



En festotago huj-oj faras bongustajojn.

folioj de fragmito kaj kuiras tiun grandan *zongzi*-on en granda fera poto. En la antaŭvespero de la nova jaro ili metas ĝin sur ofertablon por kulti la prapatrojn. En la 3-a aŭ 8-a tago ili revarmigas ĝin kaj dividas ĝin inter la familianoj.

Aĉang-nacio en la okcidenta parto de Yunnan-provinco havas la kutimon sidi ĉirkaŭ la fajrejo en la hejmo kaj maldormi tra la nokto de la antaŭvespero de la nova jaro. Estas popolrakonto: Malriĉulo La Fu havis neniun groŝon por aĉeti ion por la novjara festo. Li havis nur faskon da branĉaĵo kaj bruligis ĝin en la fajrejo en la hejmo. Noktomeze li rimarkis verdan branĉeton sur la planko kaj senintence ĵetis ĝin en la malplenan riztenujon. Tuj li estis surprizita, ke la riztenujo rapide pleniĝis de rizo, kaj de tiam li vivis bonan vivon. Poste la aliaj

imitis lin kaj esperis, ke la feliĉo falos ankaŭ sur ilin.

Nu-nacio estas unu el la plej malgrandaj nacimalplimulto de Ĉinio. La novjara festo de la nacio karakteriziĝas per originala sportado, gaja kantado kaj dancado. Frumatene de la novjara festo oni sonigas kaprokornan trumpeton kaj iras al la placo. Iuj fortaj junuloj aŭ pafas

aŭ luktas nudaj je la supra parto de la korpo, dum la virinoj ludas trapezon.

La novjara festo de Tuĝja-nacio estas unu tagon pli frua ol tiu de Han-nacio. Tuĝja-oj havas la moron “arbodemando”. Post kunmanĝo en la antaŭvespero de la nova jaro oni eltondas monbiletojn kaj gluas ilin sur arbotrunkon. Dommastro frapas la arbon per hakilo: “Ĉu vi donos fruktojn en la nova jaro?”, kaj iu sin kaŝinta malantaŭ la arbo respondas: “Jes.” Kaj la mastro demandas plu, ĉu fruktoj estos multaj kaj bonaj. Kiam li aŭdis kontentigan respondon, la homoj foriras en gajo.

Iuj nacimalplimulto havas, krom la Printempa Festo, ankaŭ sian propran novjaran feston.

Ĉjang-nacio en Sichuan-provinco havas ankaŭ sian propran novjaran feston. Se antaŭ la 1-a de la 10-a monato neniu

plenkreskulo en la vilaĝo mortas, la vilaĝo do havas en tiu tago la novjara feston. Ili faras kokojn, ŝafojn kaj bovojn el pasto kaj oferas ilin al la prapatroj. En iuj vilaĝoj oni verŝas ŝafan sangon en arbaro kaj donacas ŝafviandon al la najbaroj. Oni invitas parencojn kaj amikojn en sian hejmon por kune drinki kaj amuziĝi.

Nacimalplimulto en iuj lokoj, kie la ekonomio disvolviĝas malrapide, difinas la daton de sia novjara festo laŭ vetero, laŭ florado aŭ fruktiĝo, laŭ semado, rikolto k.a.

Derung-nacio loĝanta en la nordokcidenta Yunnan-provinco, kiu havis antaŭ 50 jaroj ankoraŭ la postsignon de primitiva komunumo, prenis la tagon, en kiu granda neĝo blokas la montpasejon, kiel la unuan tagon de nova jaro. Kaj tiu jaro daŭras ĝis la venonta neĝoblokado. Unu jaro estas dividita en 12 monatojn kun la nomoj neĝo, herboĝermiĝo, semado, florado, rikoltado, novjaro k.a. La datoj de la novjara festo de la nacioj en diversaj lokoj estas malsamaj. Sed ĝenerale la festo estas en la unua aŭ dua monato laŭ la luna kalendaro. Antaŭe ili pasigis la novjara feston kadre de patriarka familio, kaj nun kadre de vilaĝo aŭ vilaĝgrupo. Ili buĉas bovon por oferi ĝin al la ĉiela diablo. En tiu tago la invititaj parencoj kaj amikoj venas kun donaco. Junuloj de la vilaĝo, svingante glavon en la mano, prezentas dancon al la samvilaĝanoj unu post alia en akompano de gongado, cele deziri al ili riĉan rikolton kaj prosperon de brutoj. Poste la homoj kolektiĝas sur placo, kovras la oferatan bovon per bela kanaba tolo kaj dancas ĉirkaŭ la besto. Dume ŝamano drinkas kaj renversas la bovon. La homoj kune buĉas kaj distranĉas la bovon kaj kuiras la bovaĵon ĉeloke. Ili tostas je solidareco kaj faras diversajn



Ĉjang-aj virinoj dancantaj por festi la Printempan Feston

gajajn amuzaĵojn por bonvenigi la novan jaron.

La miljara tibeta kalendaro estas tre simila al la luna kalendaro, kaj la novjara festo estas la plej solena festo de la tibeta popolo. Sed la datoj de la novjara festo de la tibetnacioj en diversaj lokoj estas malsamaj. En la mezo de la 12-a monato tibetnacioj komencas preparadon de butervino kaj faruno kaj pretigi grenujon. Vespere de la 29-a de la 12-a monato ĉiuj familioj faras purigadon kaj metas rubon en difinitan angulon por sugesti, ke la familio jam elĵetis la malsanigan kaj malfeliĉigan rubon. Ili ornamas la pordon kaj fenestrojn per koloraj parfumitaj ŝtofoj kaj havas la grenujon, ŝafkapon, sekalan vinon kaj fruktojn sur ŝranko. En la grenujon ili metas manĝaĵon el sekala faruno, rostitajn sekalajn grajnoj, rostitajn fabojn k.a., kaj sur ili estas sekalaj spikoj. La nacioj ornamas per buteraj floroj la buŝojn de la kruĉoj de sekala vino kaj butera teo, kaj la

randojn de la bovloj kaj taso. Per tiaj ornamaĵoj la tibetnacioj esprimas sian deziron de riĉa rikolto kaj feliĉa vivo. Frumatene de la novjara tago, la mastroj devas tuj ellitiĝi kaj iri ĉerpi "feliĉan akvon" el rivero, por ke la familianoj uzu la akvon por sinlavo kaj trinkigo de brutoj. Ekde la sekvanta tago oni intervizitas, ludas teatron, okazigas poefagan konkurson, pafan turniron, ŝnurtiradon k.a.

Taj-nacio en la sudokcidenta parto de Yunnan-provinco kredas je hinajano kaj uzas taj-an kalendaron el miksitaj suna kaj luna kalendaroj. Tajnacioj prenas la sesan monaton kiel la komencon de la nova jaro kaj ilia novjara festo daŭras 4-5 tagojn. En la festotagoj oni kolektas florojn kaj branĉetojn por oferi ilin al budho en templo, aŭskultas litanion de bonzoj; kaj en tagmezo ili portas akvon en templon por bani budhon. Post tio la homoj kolektiĝas sur placo kaj verŝas akvon unu sur alian por esprimi benon. Oni tamburas, dancas kaj okazigas konkurson de drakaj boatoj. ■

Nuba, Ĝojlo kaj Rava

“Verdire, tiam mi estis tiel naiva, ke mi edziniĝis al li antaŭ ol koni liajn gepatrojn.”

Teksto de WANG JIANBING

Fotoj de ĜOJLO

DE aŭgusto ĝis oktobro pasintjare mi volontulis en la Centra Oficejo de UEA. Iun semajnfino mi venis en la urbon Parizo, kiun mi revis viziti. Miaj amikoj Marie Thierry kaj Maŭrice Sujet varme akceptis min. Ĉe adiaŭo s-ino Marie petis min transdoni paron da pupoj al Rava, la filino de Ĝojlo kaj Nuba, kun kiuj ŝi konatiĝis dum la 1-a Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Ŝanhajo somere de 1996.

Ĝojlo, Nuba kaj Rava estas miaj malnovaj amikoj. Dum la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto en 1991 mi ekkonis ilin. Tiam Rava estis nur 2-jara infano balbutanta Esperanton. Ĝojlo estas ŝia patro, Nuba — patrino. Interese, Ĝojlo kaj Nuba interkonatiĝis kaj amikiĝis dum la 1-a Ĉina Kongreso de Esperanto, kiu okazis en 1985 en Kunming, ĉefurbo de Yunnan-provinco en sudokcidenta Ĉinio. Tiam Ĝojlo estis laboristo de iu granda pekina kemiindustria fabriko, kaj Nuba — instruistino en Shanxi-provinco, centojn da kilometroj for de Pekino. La gepatroj de Nuba, altrangaj ŝtataficioj, malaprobis la elekton de sia filino, ĉar ili opiniis, ke la filino estas senprudenta kaj ne bone konsideras la sekvon de la edziniĝo al Ĝojlo.

Retrorigardante la aferon, Ĝojlo kaj Nuba diris: “Esperanto kaj amo subtenas nian persistemon.” Tiam ili planis, ke

aŭ Nuba transloĝiĝu al Pekino, aŭ Ĝojlo al Shanxi, aŭ ili kune al iu alia loko. Feliĉe, Nuba sukcese havigis al si okupon en Pekino. Ŝi diris: “Verdire, tiam mi estis tiel naiva, ke mi edziniĝis al li antaŭ ol koni liajn gepatrojn.” En Ĉinio gejunuloj ĝenerale konatiĝas kun la ambaŭflankaj gepatroj antaŭ la geedziĝo. Sed Nuba estas escepto.



Unuafoje eksterlande

Post la edziniĝo Nuba ekkonsciis, ke en la ĉiutaga vivo estas ne nur amo. Antaŭe en ŝia hejmo ĉiuj aferoj estis aranĝitaj de ŝiaj gepatroj kaj la servistino faris kuiradon. Nun ŝi devas zorgi pri ĉiuj bagateloj. Per sia kapablo Ĝojlo montris, ke li estas kompetenta edzo. Li estas talenta en multaj kampoj. Li lernis elektroteknikon kaj ankaŭ fotografion. Li instalas hejtilon en la hejmo, tapetis la plafonon kaj murojn kaj garnis la plankon per plastaj platoj. Kaj la lastan someron li venigis helpantojn por konstrui dometon kun areo de 15 kvadrataj metroj cele akcepti esperantistajn gastojn. Nun li estas profesia fotisto de sia fabriko.

En 1988 Ĝojlo kaj Nuba

ekhavis infanon Rava, kies nomo estis donita de Seimin, samideano laboranta en la Ĉina Radio Internacia. Antaŭ la nasko Nuba kantis Esperante al sia bebo en la utero kaj, kiam Rava venis en la mondon, Ĝojlo ĉiam parolis kun ŝi en Esperanto. En sia trijara kaj naŭ-jara aĝo Rava forte rifuzis Esperanton. Tio multe konfuzis la gepatrojn. Post konsulto de libro Ĝojlo komprenis, ke tio estas portempa fenomeno en kreska periodo de infanoj kaj li kiel antaŭe lernigis al Rava Esperanton. Por faciligi al ŝi lernadon de Esperanto kaj firme radikigi Esperanton en ŝia kapo, la gepatroj ne frue instruis al ŝi la anglan lingvon, kvankam Nuba estas anglalingva instruistino. Foje Rava sonĝe parolis Esperanton, kaj la gepatroj pensis, ke venas tempo instrui al ŝi la anglan lingvon, kaj tiam ŝi estis jam 7-jara.

Estas ĝojige, ke Rava progresis pli rapide ol siaj samaĝuloj en lernado de la angla lingvo. Dank’ al kelkjara praktikado ŝi memoris kvanton da anglaj vortoj kaj bone kaptis la ritmon de anglaj frazoj. Tio estas malfacila por aliaj geknaboj, ĉar la tono kaj vortoj de la ĉina lingvo multe diferencas de tiuj de la eŭropaj lingvoj, sed Rava facile transpasis la lingvobaron.

Por plivastigi ŝian vidkampon, Ĝojlo kaj Nuba laŭeble partoprenigis ŝin en diversaj Esperantaj renkontiĝoj. S-ino Marie Thierry, kiu donacis pupojn al Rava, konis ŝian familion pere de ŝi. En la 1-a Azia Kongreso

en Ŝanhajo, Rava vagis en la kongresejo kaj renkontiĝis kun Marie. Ĉe adiaŭo Marie donacis al Rava ludilon urseto kaj ŝerce diris al ŝi: "Mi kunportis nur unu urson al Ŝanhajo, ne diru al aliaj knaboj." Tiel ankaŭ la gepatroj konatiĝis kun la donacinto.

La urseto nun ankoraŭ sidas sur la sofo en la ĉambro de Rava.

Rava kaj ŝiaj gepatroj konas multajn alilandajn esperantistojn. Ilia hejmo jam fariĝis pekina "Ĝojlo-hotelo". Ĉirkaŭ 30 esperantistoj el diversaj landoj gastis ĉe ili.

Iusomere, kune venis 7 junaj koreaj esperantistoj. Kaj sur la planko, litoj kaj sofo kaj en la koridoro, ĉie estis homoj. Dum kelkaj tagoj ili kune manĝis, babilis kaj vojaĝis. Rava multe spertis la Esperantan etoson kaj havis nenian timon ĉe la kontakto kun alilandanoj. Rava nun estas 11-jara knabino en la 4-a klaso de elementa lernejo. Ŝi interesiĝas pri manipulado de komputilo kaj ludo de volano.



"Gajan naskiĝtagon!"

Nuba kaj Ĝojlo nun havas pli da libera tempo fari siajn proprajn aferojn. Nuba estas anglalingva instruistino de iu instituto. Antaŭ du jaroj ankaŭ ŝi allogiĝis de komputilo kaj ekstudis pri instruado per komputilo. Pasintjare ŝi kaj ŝiaj amikoj kune faris komputilan kompaktan diskon pri anglalingva instruado. Post tio ŝi pensis, kial ŝi ne faris kompaktan diskon pri Esperanto. Kun la ideo ŝi kaj la

familianoj sin ĵetis en la laborojn por la Esperanta kompakta disko. Havante sperton pri la anglalingva disko, ŝi ne havas grandan problemon pri disko de Esperanta instruado. Sur la kompakta disko estas dialogoj de la geedzoj kaj kanto de la filino, Esperanta prononcado de Nuba kaj pentraĵoj de Ĝojlo. Ĝi estas taŭga por helpi infanojn lerni nian lingvon. Unuavide mi eĉ ne kredis, ke ĝi estas farita de ili mem. Ĝi estas tre bela, interesa kaj profesie aranĝita.

Utiligante la avantaĝon de instruado,

Nuba starigis kelkajn Esperantajn kursojn en sia instituto. Ŝiaj kolegoj ekkonas Esperanton kaj komprenas ilian agon. Komence, kiam Nuba kaj Ĝojlo instruis al Rava Esperanton, iuj eĉ primokis ilin. Sed poste oni lernis ilian instruan metodon por infano.

"Ĝojlo-hotelo" akceptas ĉiujn samideanojn. Ĝojlo ŝatas kolekti diverslandajn mapojn. Se vi gastos ĉe ili, neforgesu kun porti mapon. ■



Dum la 14-a Komuna Seminario en Tianjin en 1995

lom pri ĉinaj pladoj

En nia revuo "El Popola Ĉinio" plej plaĉas al mi la ĉina kulinara arto (indus doni pli da manĝaĵ-receptoj).


Gonĉarov A. (Ukrainio)

de XIANG HONG

LA manĝaĵoj ĉinaj kaj alilandaj, nuntempaj kaj antikvaj, havas ĉiu siajn proprajn trajtojn. Ĉinaj pladoj karakteriziĝas per siaj aparta historio, kulturaj trajtoj kaj eminenta kulinara arto. Ĉinio havas kulinaraĵn teorion kaj sperton akumulitan dum jarmiloj kaj nun ĝi havas centojn da specoj da spicoj, el kiuj la plej ofte uzataj estas oleo, salo, sojo, vinagro, ŝenoprazo, ajlo, zingibro kaj zantoksilo (*Zanthoxylum bungeanum*), inter kiuj oleo kaj salo estas nemankigeblaj. Ĉina filozofo Mengzi (ĉ. 390-305 a.K.) diris: "Manĝado kaj seksumo estas instinktoj." Iuj opinias, ke dum jarmiloj seksumo en Ĉinio ofte estis subpremata de la feŭda etiko, tial oni deturnis sin de la atento pri seksumado por serĉi eksciton el diversaj manĝaĵoj, pro kio formiĝis apartaj kulinaraĵ metodoj.

Ĉinio estas granda lando kun diversaj klimatoj, malsamaj geografiaj kondiĉoj kaj produktoj, diferencaj popolaj moroj, kutimoj kaj tradicioj, kaj sekve de tio en preparado de manĝaĵoj oni kreis multajn receptojn. Kun historia disvolviĝo kaj kultura akumuliĝo formiĝis pluraj sistemoj de pladoj. Jam en la dinastioj Qin kaj Han (221 a.K.-220 p.K.) la ĉinaj pladoj ekhavis malsamajn lokajn gustojn:

nordanoj ŝatas la salan, Sichuan-anoj la akran kaj la loĝantoj de la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero la dolĉan. Nun la ĉina kulinara arto havas 12 sistemojn, el kiuj 4 estas bone konataj, t.e. la Shandong-a, Sichuan-a, Jiangsu-a kaj Guangdong-a. Sole la Sichuan-a sistemo havas 5 000 receptojn. Krom tio estas ankaŭ sennombraj



vegetaraj, islamaj kaj naciminoritataj receptoj. Ja estas malfacile respondi per unu artikolo la demandon, kiel la ĉinoj preparas pladojn. Ĉi-sube mi nur povas simple konigi, kiel oni preparas ĉinajn familiajn pladojn, kaj ne pritraktos la restoraciajn.

Mia amiko, kiu iam lernis en Germanio, diris al mi, ke en germanaj kuirejoj estas pesilo, vekhorloĝo kaj diversaj mezurglasoj. La kuirejo impresas kiel laboratorio. Mia amiko ne komprenas, kial germanoj bezonas vekhorloĝon eĉ por kuiri ovon. Siaflanke lia germana kamarado miras, ke ĉinoj povas fari bongustan pladon de cepo kun

ovo, uzante neniun mezurilon. Ĝenerale, ĉinoj bezonas multe da tempo en preparado de manĝaĵoj, tial la kuirejoj en la studentaj pensionoj estas ofte okupataj de ĉinaj studentoj.

Ĉinoj opinias, ke ju pli fajnan pladon oni faras, des pli bonan guston ĝi donas. Tial la preparado bezonas kompare longan tempon.

La ĉinoj preparas pladojn ĝenerale tiamaniere: Meti la materialojn en akvon, oleon aŭ vaporon por kuiri ilin ĝis prestiĝo kaj uzi spicojn por la koloro, gusto kaj odoro de la pladoj. Spertaj kuiristoj scias, kion oni devas fari por bone konservi nutrojn de la manĝaĵoj. Tio postulas, ke la kuirado ne devas daŭri tro longe nek tro mallonge, ĉar tro longa kuirado

damaĝas la nutrojn kaj tro mallonga ne povas mortigi la mikrobojn.

La ĉinoj preparas manĝaĵojn ĉefe per frito, vaporumo, stufo, frikaso k.a.

Mi prenu ovon kiel ekzemplon. Ni ĉinoj havas pli ol 20 receptojn pri manĝaĵoj el ovoj.

Poĉitaj ovoj ofte vidiĝas sur manĝotablo de okcidentanoj, sed ĉinoj ne ŝatas ilin pro ilia malforta gusto. La ĉinoj preferas kuiri ovojn en peklakvo aŭ en akvo kun teo. Oni faras peklitajn ovojn tiamaniere: duonkuiri ovojn en bolanta akvo, meti ilin en bolintan peklakvon kun sojo, riz-vino,

sukero, salo, zantoksilo, ilicio kaj sekigita oranĝŝelo kaj kuiri ilin super milda fajro duonhoron. En multaj vendejoj de Ĉinio estas aĉetebla kunmetita pulvoro por fari peklakvon. Oni povas meti tian pulvoron kaj ovojn en akvon kaj kuiri ilin kune. Se oni kuiras ovojn en akvo kun teo, salo kaj sekigita oranĝŝelo, oni povas ricevi ovojn kun gusto de teo.

En la okuloj de ĉinoj ŝinkomleta sandviĉo estas okcidentstila kaj multaj ĉinoj preferas la ĉinan guston.

Ĉinoj ŝatas ovojn frititajn. Ili ofte fritas kirlitajn ovojn kun tomato, poreo, cedrelo, cepo, kapsiko aŭ sekigita rafano. Sube mi prezentos aliajn pladojn el ovo kaj ilian faradon.

Fritaĵo el kirlitaj ovo: unue oni kirlas la ovojn en bovlo kaj metas en ilin konvenan kvanton da salo kaj poste verŝas oleon en paton super fajro, kaj kiam

la oleo ege varmiĝas, oni metas en la paton la kirlitajn ovojn. Post turnado de la ovo estas pretigita la plado, kiu similas al ronda kuko. Por bone fari la pladon estas necesaj akra fajro, sufiĉe da oleo kaj konvena turnado de la ovo en la pato.

Frititaj ovo kun poreo: (1) Friti kirlitajn ovojn kaj dispecigi ilin. Tranĉi poreon en pecojn 3 cm. longajn, meti ilin en la paton kaj friti ilin kune kun la preparitaj ovo, turnadi ilin, aldoni salon kaj glutamaton (bongustiga pulvoro) kaj daŭrigi la turnadon. Jen la plado estas preta. (2) Dispecigi poreon kaj miksi ĝin kun la kirlitaj ovo, aldoni al ili salon kaj glutamaton. Verŝi ilin en la paton kun varmigitaj oleo super fajro. Turnadi ilin. La kvantoj de poreo kaj ovo estas difinitaj laŭ plaĉo, kaj por fari pladon per la unua metodo estas bezonata kompare malpli da ovo

kaj per la dua — 250 gramoj da poreo kaj 6 ovo, kaj ne necesas friti ilin tro longe.

Vaporumita ovokremaĵo: Kirli du ovojn en bovlo, aldoni iom da salo, glutamato kaj porkograso kaj duonlitron da akvo, meti la bovlon en marmiton kaj vaporumi ilin 8 minutojn per milda fajro. Kiam la ovo koaguliĝas, la plado estas preta.

Iuj konsilis, ke ni ne prenu glutamaton, ĉar ĝi estas kemiaĵo malutila al la sano. Efektive, glutamato havas grandan debiton en Ĉinio. Fakuloj diris, ke konvena kvanto da glutamato estas bongustiga kaj ne damaĝas la sanon.

Mi pensas, ke fari ĉinajn pladojn estas malfacile. Mi proponas al niaj okcidentaj samideanoj veni al Ĉinio kaj propraokule viziti ĉinan kuirejon por pli bone koni la preparadon. ■



HIERAŬ KAJ HODIAŬ

En la lastaj 20 jaroj, kune kun ŝanĝiĝo de la ĉina ekonomia vivo, iom altiĝis la nivelo de la popola vivo, kaj nerimarkite ŝanĝiĝis ankaŭ la koncepto de la ĉinoj. Sube ni citu kelkajn ekzemplojn pri tio.

Kiel konsumi? Ĉinoj kutimas elspezi laŭ la enspezo, vivi ŝpareme kaj havi ŝparmonon por

eventuala bezono. Lastatempe aperis ĉe malmultaj ĉinoj la nova vivmaniero, nome "vivi de morgaŭa enspezo". Ili prunteprenas monon de banko por aĉeti aŭton kaj loĝejon.

Akcenti sian propran valoron. En elektado de profesio, parto de la ĉinoj ne plu akcentas la socian pozicion de la profesio, sed la enspezon kaj pruvon de sia propra valoro. Laboruloj jam akceptis la koncepton "gajni

laboron per kapablo kaj enoficiĝi per konkurenco".

Malgrandiĝas la familio en Ĉinio. Jam ne estas multaj familioj, en kiuj kune loĝas pluraj generacioj aŭ kelkaj fratoj. Trimembra (edzo, edzino kaj ilia solinfano) familioj konsistigas grandan parton de la ĉinaj familioj.

Naskolimigo jam enradikiĝis en la koro de la ĉina popolo. Pli kaj pli multaj homoj volonte observas la politikon pri naskolimigo kaj ŝatas eŭgenikon. "Ju pli da infanoj, des pli da feliĉoj", "naski filon por garantii vivtenon en sia maljuneco" kaj similaj malnovaj vidpunktoj jam arkaikiĝis.

ŜTONA LEONO

Leono estis unu el la totemoj de la ĉinoj. Ĉinoj tre ŝatas havi ŝtonajn leonojn antaŭ palaco, maŭzoleo, ponto, domo k.a.

Antaŭ Tian'anmen-pordego kaŭras du paroj da ŝtonaj leonoj. La delikata gravurado kaj natura pozo faras la leonojn ŝajne vivaj. Kaj 15 kilometrojn for de Tian'anmen estas fama ponto Lugouqiao. Sur la balustroj ambaŭflanke de la ponto estas 485 gravuritaj leonoj kun diversaj pozoj. Iuj leonoj ne estas facile rimarkeblaj, sekve ĉe pekinanoj estas kompara diro, ke io estas "nekalkulebla kiel leonoj sur Lugouqiao-ponto".

En la antikveco instalo de ŝtonaj leonoj observis certajn regulojn. Ŝtonaj leonoj servas ne nur kiel ornamaĵoj kaj gardantoj de la pordo, sed ankaŭ kiel marko de la socia pozicio de la mastro de la domo. Kutime la ŝtona leono maldekstre de la pordo estas vira, kun pilko sub la piedo, kaj simbolanta potencon; dum tiu dekstre de la pordo — ina, kun leonado ĉe la piedo, kaj simbolanta fekundecon de la



Ŝtona leono antaŭ antikva templo de Wutai-monto

Foto de CONG XIANSHEG

familio. La nombro de la bukloj sur la kapoj de la leonoj simbolas la rangon de la mastro, ju pli multaj estas la bukloj, des pli alta la rango.

PEKINA AKVARIO

Dank' al finkonstruiĝo de la Pekina Akvario en la Pekina Zoo, loĝantoj en Pekino, kiu distancas de maro pli ol 200 kilometrojn, ekhavis la ŝancon "kontaktiĝi kun maro". La konstruaĵo, blue kaj

flave kolorigita, havas la formon de bukenco, kaj la tegmento ĉarpentita el ŝtalaj trusoj.

Infanoj tre ŝatas propramane tuŝi bestojn en zoo, sed tio ofte estas malpermesata. En la akvario estas "tuŝebla baseno", en kiu vivas asterioj, eĥinoj, konkoj, ĥelonioj k.a. Infanoj ĝoje etendas manon por tuŝeti ilin kaj en tio ili sentas ekstaziĝon.

En la akvario estas subakva koridoro. Ĝin traitante, la vizitantoj povas vidi dekmilojn da belaj fiŝoj kaj multkoloraj koraloj. La koridoro estas ekipita per du-nivelaj elevatoroj.

En vasta baseno naĝas "leopardo-ŝarko", timinda laŭ la nomo sed fakte tre milda, "flegistino-ŝarko", forta kaj ĉiam krozanta plej supre en la akvo, aroganta "citrona ŝarko" kun ruĝaj okuloj kaj akraj dentoj, kiu manĝas ĉiufoje almenaŭ 4-5 grandajn fiŝojn.

Ĉiutage en la akvario oni ofertas prezentadon. Bone dresitaj balenoj kaj delfenoj dancas



Submara mondo de la Pekina Akvario en la Pekina Zoo

baleton en akompano de bela melodio, kaj petolaj marleonoj faras diversajn amuzajn kaj malfacilajn pozojn. Prezento de la bestoj rikoltas varman aplaŭdadon kaj huraon.

KOLORAJ ARGILAJ PUPOJ

Lastatempe oni trovis 11 kolorajn argilajn pupojn duonnudajn en 800-kvadratmetra kavo ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K. sur la trono). La supra korpo de la pupoj estas nuda kaj farbita je pale roza koloro.

Tiuj pupoj estas malsamaj ol la terakotaj militistoj elterigitaj de post 1974. La nunaj pupoj havas diversajn pozojn. La pupo n-ro 1, 175 cm. alta, rekte staras, tenante la dekstran pojnnon per la maldekstra mano antaŭ la ventro. La pupo n-ro 3 altas 190 cm. kun muskolaj brusto kaj brakoj, la ventro iom barela, umbiliko elstara, zono nodumita sub la

umbiliko, la dekstra brako suprenlevita, la maldekstra dikfingro enigita en la zonan, la maldekstra gambo iom kurbigita antaŭen, la dekstra piedo tretanta malantaŭen. La pupo n-ro 5 altas 200 cm., la nudaj brakoj montras fortikecon, la manoj estas antaŭ la abdomeno, kun oblonga leda sako en mano antaŭ la mallonga jupo, kaj la sako estas kunligita kun la zono.

Fakuloj opinias, ke tiuj argilaj figuroj en mallonga jupo estas artistoj de teatro, akrobatiko kaj lukto. Unuafoja trovo de tiaj figuroj estas tre valora por esploro pri la kortega amuzado de Qin-dinastio.

La registaro de Shaanxi-provinco decidis konstrui Muzeon de Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiu inkluzivos la Muzeon de Terakotaj Militistoj kaj Militĉaroj, la Muzeon de Bronzaj Ĉaroj de Qin-dinastio kaj la muzeon de kiraso de la dinastio. La nova muzeo eble estos la plej granda en Ĉinio.

● KURANTAJ AFEROJ

● En la 20-a de novembro 1999 Ĉinio lanĉis sian unuan kosmoŝipon "Shenzhou" kaj sukcesis repreni ĝin en la sekvanta tago. La kosmoŝipo ne kunportis homon.

Senhoma kosmoŝipo estas preludo de lanĉo de homa kosmoŝipo. La sukcesa lanĉo de senhoma kosmoŝipo de Ĉinio donas esperon al Ĉinio en lanĉo de homa kosmoŝipo. Kosmonaŭtiko bezonas multajn altajn teknologiojn, kiaj portilo, informadika biologio kaj kemio kaj en la pasinteco nur Usono kaj Rusio posedis la arton. La portilo kaj la kosmoŝipo estas faritaj de Ĉinio mem. Tio pruvis, ke kosmonaŭtiko de Ĉinio eniras en la maturiĝan kaj disvolviĝan periodon.

● La nova domo de la Pekina Ĉefurba Flughaveno estis lanĉita al uzo. Kun areo de 320 mil kvadrataj metroj, ĉiujare ĝi povas trairigi pasaĝerojn je 35 milionoj da homoj, akcepti kaj ekspedi aviadilojn 190 000-foje. Aŭtomata valiza klasifika sistemo estis instalita.

● Ĉinio konstruis en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono fervojon kun longo de 1 446.371 kilometroj. La fervojo komenciĝas de Turpan en la oriento de Xinjiang kaj finiĝas en Kashi, grava urbo en la suda Xinjiang. Multaj el la tieaj loĝantoj la unuan fojon vidis trajnon. La fervojo ludos gravan rolon en la ekonomia disvolviĝo de la nordokcidenta parto de Ĉinio.

● Post 8-jara konstruado, la plej granda elektrejo Ertan de Ĉinio estis lanĉita al elektroprovizado. La elektrejo sur Yalong-rivero en Sichuan-provinco konsistas el 6 generatoroj kun kapacito de 550 mil kilovattoj. Ĉiujare la generatoraro kun totala kapacito de 3.3 milionoj da kilovattoj liveros 17 miliardojn da kilovathoroj da elektro.

● En Haikou de Yunnan-provinco de Ĉinio oni trovis fosiliojn de la plej antikva vertebrulo de la mondo, kaj oni nomas ĝin Haikou-insekto. Dank'

al la trovo de la fosilioj de la insekto kaj Kunming-fiŝo antaŭ 530 milionoj da jaroj, la origino de la vertebruloj inkluzive de homo fruiĝis pli ol 50 milionojn da jaroj ol la nuna konkludo. Sur oranĝkolora skisto la grize blua Haikou-insekto estas klare videbla. Pere de mikroskopo oni povas klare vidi la koron, okulojn, voston, dorsan angion, inteston kaj anuson de la insekto... Oni miris, ke la insekto jam havis relative perfektan cerbon. Fakuloj asertis, ke la trovo de Haikou-insekto renovigos la historion de vivo sur la terĝlobo.

● Nun la tuta mondo konsterniĝas pro manko de klinika sangoprovizo kaj kruca infekto de sangotransfuzado. Post multjara esplorado Ĉinio jam havas industrian produktadon de sangosurogato. La sukcesa elfaro de sangosurogato mildigas la problemon de manko de sango kaj evitas sangan poluon, krucan infekton kaj la sangotransfuzan reakcion. La sangosurogato estas longe konservebla, facile transfuzebla kaj transportebla, kaj tio multe altigis la kapablon en urĝa savo kaj sangotransfuzo.

● En la nomlisto de grave poluitaj urboj publikigita de la Monda San-Organizo, oni povas legi la nomojn de la ĉinaj urboj Taiyuan, Pekino, Urumqi kaj Lanzhou.

Ĉiujare en Ĉinio oni konsumas 1.2 miliardojn da tunoj da karbo, kio serioze poluas la medion. Krome la urboj estas poluataj de industria pulvoro, industria gaso, aŭta vostogaso, polvo de konstruejo kaj bruligado de fojno en la kamparo. En tiuj urboj oni faras pozitivajn kontraŭrimedojn por moderigi la poluadon, ekzemple en Pekino la registaro malpermesis hejti per karbo,

herbizis la teron kaj pavimis teran plankon per brikoj. Sed Ĉinio estas disvolviĝanta lando, kaj la kontraŭrimedoj ne povas ricevi sufiĉan monhelpon, tiel ke la laboro kontraŭ poluado de la urboj estas peniga kaj longedaŭra.

● La 19-a de decembro de 1999 estas la 35-a datreveno de la inaŭguro de Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio



Gastoj en la kunsido por la 35-a datreveno de la inaŭguro de Esperanta disaŭdigo de ĈRI

Internacia. Samideanoj de la Esperanta Sekcio de Ĉina Radio Internacia multe penis en la pasintaj 35 jaroj kaj konstruis inter la mondaj samideanoj ponton por amikeco, paco kaj interkompreno. Aŭskultantoj laŭdis, ke ilia disaŭdigo malfermis fenestron por koni Ĉinion. Multaj samideanoj en- kaj eksterlandaj skribis al ili esprimante saluton, gratulon kaj bondezirojn.

● En la fino de 1999 hungara aviadisto la unua sukcesis traflugi la karstan truon Tianmendong kaj estis enskribita en Guinness-rekordojn. Post li tion sukcese faris ankaŭ aviadistoj de Rusio, Usono, Kazahŝtano, Ĉeĥio kaj Litovio.

Tianmendong situas sur Tianmen-monto en la pitoreskejo Zhangjiajie en la okcidenta parto de Hunan-provinco, Ĉinio. La truo situas sur la absoluta alteco de 1 261 metroj. La alteco de la truo estas 127.37 metroj, la profundeco 279.42 metroj, kaj la malplej granda larĝeco en la truo 28.03 metroj. Ŝajne tia truo sur tiel alta apika rokmuro estas unika en la mondo.

Versparo kaj lanterna enigmo

de WANG HANPING

ANTAŬ la Printempa Festo ĉinoj ŝatas alglui versparon sur pordon por pliigi la festan atmosferon.

Versparo estas aparta poezio en la ĉina literaturo. Ĝi konsistas el du versoj, koncizaj sed profundsencaj. Versparo de la Printempa Festo originis de antikva moro: Sur du tabuloj el persikarba ligno oni skribis aŭ pentris ion kaj pendigis ilin ambaŭflanke de la pordo por forpeli diablojn kaj ĉiujn malbonaĵojn. Tiu moro poste disvolviĝis kaj fine fariĝis la nunaj bonaŭspiciaj vortoj skribitaj sur ruĝa papero, pendigita ambaŭflanke de la pordo. Ili enhavas ĉefe adiaŭon al la malnova jaro kaj esperon pri feliĉo, riĉo kaj sano en la nova jaro. Antaŭe ofte vidiĝis tiaj versparoj, kiaj

“En petard-eksplodo pasas
la malnova jaro,
Printempon bonvenigas ni per
nova versparo.”

“Feliĉas la homoj de nacia
forto,
Longigas ilian vivon riĉa
rikolto.”

“Pasis vintro, ĉio portas
verdan koloron,
Ĝoje kantas birdo, forte
aromas floro.”

Antaŭ tiaj versparoj ĉiuj estas ĝojaj pro ŝanĝiĝo de la atmosfero ĉe la Printempa Festo.

Divenado de enigmoj sin trovas preskaŭ ĉie en la mondo, sed tiu en Ĉinio estas originala. Post la Printempa Festo la unua plenluno okazas la 15-an de la unua monato laŭ la luna kalendaro, t.e. Lanterna Festo.



Pordo kun versparo kaj bildoj de pordodio

Tiuvespere oni pendigas lanternojn kaj eksplodigas petardojn, post vespermanĝo ili pasumas sur strato kaj ĝuas diversajn lanternojn kune kun siaj familianoj kaj amikoj. Sur multaj lanternoj legiĝas enigmoj. Aprezante lanternojn, oni cerbumas por diveni ilin, kaj solvintoj ricevas premion. Enigmodivenado okazas ankaŭ en aliaj festoj kaj amuzoj.

Lanternaj enigmoj estas diferencaj de la ordinaraj. Ĝenerale, ili estas koncizaj, mallongaj kaj iafoje similaj al versparoj kaj en ili ofte kaŝiĝas la senco de la strukturoj kaj signifoj de ĉinaj ideogramoj, proverboj, homaj kaj lokaj nomoj kaj titoloj de teatroj kaj filmoj. Ekz. estas la ĉinaj ideogramoj 师 (instruisto) kaj 帅 (marŝalo). La du ideogramoj estas tre similaj en la formo kaj la diferenco estas nur en unu streko, tial oni teksis la rebuson “Kun streko li povas instrui nur kelke da lernantoj, sed sen la streko li kapablas

komandi tutan korpuson.” Ĉar la ĉina lingvo multe diferencas de nia Esperanto, tial por mi estas tre malfacile konigi al niaj legantoj tiujn rebusojn en nia lingvo. Sube mi prezentos kelke el ili, divenu, niaj estimataj samideanoj, se ili plaĉas al vi.

“Skuas ĝi florojn, balancas
arbon,

Formovas nubojn, krispigas
akvon.” (Natura fenomeno)

“Malgraŭ junaĝo, longan
barbon ĝi portas,
Mekas senhonte, ĉiujn panjo
ĝi vokas.” (Besto)

“Oni mortbatas ĝin por si,
kaj batas sin pro ĝi,
Post morto el ĝia ventro
fluas homa sango.” (Insekto)

“Kreskante sur monto, ĝi
estas rufa;

Se en akvo, ĝi faras la akvon
verda, ruĝa.” (Vegetalo)

“Malfermas poŝon dek fratoj
kune,
Eniras ĝin kvin fratoj
samminute.”

(Movo en la ĉiutaga vivo) ■

“La Familio”

“La Familio” rakontas pri granda feŭda familio el kvar generacioj. Ĝi priskribas la amon inter gejunuloj, la kruelan persekuton de la feŭda etiko al virinoj kaj ilian tragikan sorton. La aŭtoro estas Bakin, fama ĉina verkisto kaj veterana esperantisto. Li modlis serion da karakterhavaj personoj per forta arteco kaj enkorpigis sian amon kaj malamon en tiujn rolojn de la romano por montri sian belan idealon.

1999. 572 p. 148 x 210 mm. Ilus. Bind.


Prezo: 22.00 USD

Sendokosto: 5.00 USD

Mendu ĉe: ● Distribua Fako de EPĈ

● Libroservo de UEA

● Nia peranto en via lando



“Cent Ĉinaj Fabloj”

La libro enhavas cent fablojn el la antikva Ĉinio, kaj multaj el ili estis verkitaj de filozofoj, kio pliprofundigis la filozofion de tiuj fabloj. Delikataj ilustraĵoj donas artan plezuron de alia kategorio.

1999. 160 p. 110 x 180 mm.

Prezo: 6.00 USD

Sendokosto: 2.00 USD

Mendu ĉe: ● Distribua Fako de EPĈ

● Libroservo de UEA

● Nia peranto en via lando

Kontribuaĵoj petataj por la konkurso “50 jaroj por EPĈ”

50 jaroj por

Esperanto

Paco

Ĉinio

En majo 2000 la redakcio de “El Popola Ĉinio” festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo EPĈ, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson “50 jaroj por EPĈ” kaj sincere petas vian kontribuaĵon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPĈ — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPĈ...

Viaj kontribuaĵoj povas esti en ajna stilo kaj ajna formo. Estas tre bonvenaj koncernaj

fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuaĵoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPĈ. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuaĵojn en la rubriko “50 jaroj — EPĈ”. La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPĈ 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La Red.




Teksto de XIA GENQI

Emajla elefanto

La ĉizita emajla elefanto en la foto estas farita el kupro kaj tegita per oro. La elefanto prenas staran pozon, kun rostro volvita kaj vosto falanta. Sur ĝia dorso estas selo kaj trezora vazo. Sub ĝiaj piedoj estas piedestalo kun balustrado ĉe la supro. La vazo, la elefanto kaj la piedestalo, ĉiuj estas ornamitaj per desegnoj de nuboj, kaj la artaĵo kolore emajlita surhavas ankaŭ desegnojn de florbranĉetoj. La selo estas ornamita per desegnoj de drakoj en nubaro kaj ankaŭ la kuseno ornamita per tiaj desegnoj. La artaĵo estas liturgia objekto por budhisma litanio ĉelo. Troviĝas ankaŭ alia samspeca. Ambaŭ estis faritaj en Kantono kaj tributitaj al imperiestro Qianlong en 1746.

lli, 174 cm.
altaj, 102 cm.
longaj kaj 59 cm.
larĝaj, estas konservataj en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Pekino





Rododendro

Foto de SU LIANGZHI

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》二〇〇〇年第二期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2